


エスペラント狂言

# Noaj Komedioj

日本語・エスペラント対訳 en la japana kaj Esperanto

Tradukis SIMATANI Takesi



## ENHAVO (目次)

附子 (ぶす) 諸流	Akonito (laŭ kuranta skolo) .....	4
棒縛 (ぼうしばり) 狂言記拾遺 卷三の一	Baston-Ŝnurado .....	14
居杭 (いぐひ) 諸流	Igui (laŭ kuranta skolo) .....	20
しびり 狂言記外五十番卷二の四	Podagro .....	31
抜殻 (ぬけがら) 狂言記 卷一の四	Ŝelo .....	34
樋の酒 (ひのさけ) 狂言記拾遺 卷一の七	Sakeo pere de tubo .....	38
貰智 (もらいむこ) 狂言記 卷一の五	Bofilo .....	43
武悪 (ぶあく) 狂言記 卷五の四	Buaku .....	47
こんくわい (釣狐) 狂言記 卷二の二	Onklo-Vulpo .....	54
伯母ヶ酒 (おばがさけ) 狂言記 卷二の四	Sakeo de Onklino .....	60
二千年紀 (じせんねんき) 新作狂言	Du Jarmiloj (originala) .....	62
(2000 年に熊本市で開催された第 87 回 日本エスペラント大会閉会式で上演。		
Ĉe ferma ceremonio de la Japana Esperanto-Kongreso en Kumamoto)		
菌山伏 (くさびら) 狂言記外五十番 卷一の四	Fungoj .....	65
くさびら 山本東 (あまつ) 本 (大蔵流) 一部略	Fungoj .....	67
いろは 狂言記 外五十番 卷二の二	ABĈĈ .....	71
縄綱 (なわない) 諸流	Ŝnurumo .....	73
仏師 (ぶっし) 狂言記 卷三の十	Statu-metiisto .....	87
柿山伏 (かきやまぶし) 狂言記 卷三の五	Jamabuŝo sur persimon-arbo .....	91
針立雷 (はりたて いかつち) 続狂言記 卷一の九	Tondro kaj akupunkturo .....	94
蝸牛 (かぎゅう) 山本東本 (大蔵流)	Heliko .....	100
布施無経 (ふせない) 狂言記拾遺、卷五の七	Almozo .....	108
鬼清水 (おにしみず) 狂言記外五十番の五	Fonto .....	115
川上地蔵 (かわかみ) 狂言記外五十番卷三の五	Kawakami .....	118
盆山 (ぼんさん) 狂言記外五十番卷三の六	Miniaturo .....	121
口真似 (くちまね) 大蔵虎寛本『能狂言』	Imito .....	124
ザメンホフ 新作狂言	Zamenhof (originala) .....	127
鈍根草 (どごんさう) 狂言記 卷三の三	Miogo kaj Akvopipro .....	130
鬼の養子 (おんじ) 続狂言記 卷三の五	Adoptito de Demono .....	136
竹生島詣 (ちまぶし) 狂言記外五十番 卷三の一	Ĉikubu .....	141
附子 (ぶす) 狂言記 卷三の四	Akonito .....	146
庭鳥智 (にわと) 狂言記外五十番 卷二の八	Kokeriko! .....	150
能舞台	Noa Teatro .....	3
狂言について	Pri noaj komedioj .....	5
能と狂言との違い	Diferencoj inter la artoj .....	46
第一版 (2001 年) の編集メモ	Notoj pri manuskripto (2001) ...	63
狂言の装束	Vestoj en Komedio .....	64



## 附子 (ぶす)(諸流)

登場人物：主、太郎冠者、次郎冠者

主 (熨斗目(のめ)、長袴(ながか)、小刀(こが)、扇)「これはこの邊(あた)りの者でござる。召使ふ者呼び出だいて、申しつくる事がござる。太郎冠者居(い)るかやい。」

シテ (太郎冠者。縞熨斗目(しろめ)、狂言袴(かみ)、腰帶(こし)、扇)「はあ。」

主「次郎冠者をも呼べ。」

シテ「畏(かし)まつてござる。次郎冠者召す。」

次郎冠者 (シテに同じ)「心得た。」

二人「兩人ともにお前(まえ)に。」

主「汝(な)らを呼び出(だ)だすは別(べ)の事でも無い。某(それ)はさる方(かた)へ遊山(ゆさん)に行く程(ほど)に、兩人ともによろ留守をせい。」

二人「畏(かし)まつてござる。」

主「それについて汝らに預くる物がある程に、それに待て。」

二人「はあ。」

主 (腰桶(こし))を持ち出る)「やい〜。これを汝らに預くる程によろ番をせい。」

シテ「してあれは何でござる。」

主「あれは附子(とら)ぢやよ。」

シテ「それならば兩人に一人なあ。」

次「お供(と)に伺候(し)致しませう。」

主「汝らは何と聞いたぞ。」

シテ「あれが留守ぢやと仰(お)せられまするによつて兩人に一人お供に参らうとの申(ま)し事でござる。」

主「それは汝らが聴きやうが悪い。あれは附子と言うて人の身に大毒(た)の

## Akonito(laŭ kuranta skolo)

tradukis SIMATANI Takesi 1996

Mastro: (Kun longa *KAMISIMO*, mallonga glavo kaj faldita ventumilo) Mi estas loĝanto en ĉi tiu loko. Nun mi ion ordonos al la servistoj. Mi voku: Kie estas *Tarookazya*?

Tarookazya:(Kun *KYOOGEN*-stila *KAMISIMO* kaj ventumilo) ♪ Jen, antaŭ vi!

M: Venu ankaŭ *Zirookazya*.

T: Laŭ via ordono! *Zirookazya*! Tuj venu!

*Zirookazya*: (same kiel *Tarookazya*) ♪ Jen!

Ambaŭ: Ni ambaŭ estas antaŭ vi!

M: Mi havas ion ordoni: Hodiaŭ mi iros ekskursi. Vi ambaŭ bone gardu la domon dum mia for-esto.

Ambaŭ: Laŭ via ordono!

M: Dum mia foresto mi deponos ion al vi. Atendu momenton!

Ambaŭ: Jes, Sinjoro!

M: (Alportas nigran tinon) Mi metas ĉi tion sub via gardo. Estu bonaj gardantoj.

T: Kio do ĝi estas, Sinjoro?

M: Ĝi estas akonito.

T: Do, unu el ni, ĉu ne?

Z: Jes, sekvos vin.

M: Kion vi aŭdis?

T: Vi diris, ke ĝi estas akompananto. Do, unu el ni devos sekvi vin por gardi ĝin.

M: Ha, vi aŭdis tute erare! Ĝi estas ne akompananto, sed akonito: Plej

## 狂言について

狂言は能の一部として前段と後段をつなぐ間(あ)狂言と、独立した演劇としての狂言があり、どちらも狂言方(か)と呼ばれる役者が演じます。

最近では狂言のみを鑑賞することも多くなりましたが、元々は能を主として、能と狂言を交互に演じるのが伝統的な上演形態でした。

能が伝説上の死者の幽玄を演ずるのに対して狂言は(中世の)現在を生きている人々の日常生活を明るく描いています。

物で、あの方から吹く風に當つてさへ、たちまち滅却(めきやく)する程に、必らず側へ寄らぬやうにしてよう番をせい。」

シテ「してその大毒の物を何とてこなたにはもて扱ひをなされますぞ。」

主「不審尤(もつ)もぢや。あれは主(ぬ)を思ふ物で、その主が取り扱へば何事も無し、餘人が取り扱へばそのまま滅却する程に、必らず側へ寄らぬやうにして番をせい。」

シテ「その儀ならば」

二人「畏(かし)まつてござる。」

主「やがて戻らうぞ。」

二人「やがてお歸りなされませい」

(兩人主を見送る)

シテ「いやなう〜。今日は頼(たの)うだ人のお留守ぢやによつて、ゆるりとみて話さうぞ。」

次「何がさてゆるりとみて話さうとも。」

シテ「まづ下におりやれ。」

次「心得た。」

シテ「いやなう。何と思はしますぞ。いづ方へお出(い)でなさるとあつて

## Pri noa komedio

Noa komedio(*KYOOGEN*) estas foje nur unu parto de noo liganta la unuan kaj duan aktojn, foje memstara komedio. En ambaŭ ludas aktoroj tiel nomataj *KYOOGEN-KATA*.

Lastatempe oni ofte prezentas nur noajn komediojn. Sed en malnova tempo nooj kaj noaj komedioj estis alterne ludataj.

En nooj aperas fantomoj de famaj herooj en la historio, dum en noaj komedioj aktivis tiamaj ordinariaj homoj (en Mez-Epoko).

danĝera al homo. Eĉ vento de ĝia direkto tuj pereigos vin. Ne pre restu for dum gardado.

T: Kial vi povas senpere porti ĝin tiel danĝeran?

M: Prava demando! Ĝi estas lojala al sia mastro, sed pereiga al aliaj, kiuj tuŝas ĝin. Ne pre restu for dum gardado.

T: Ni ambaŭ bone...

Ambaŭ: komprenis vin!

M: Baldaŭ mi revenos!

Ambaŭ: Ni atentos vin sopire!

(Foriras la Sinjoro.)

T: Hej, amiko! Hodiaŭ forestas la Sinjoro. Ni parolu senĝene.

Z: Jes, ni parolu tute libere!

T: Antaŭ ĉio ni sidiĝu.

Z: Jes, ni sidiĝu.

T: Kiel vi pensas? Ien ajn li iras kun unu el ni. Tiu akonito estas tiel

も、兩人に一人お供に召(め)連れられぬといふ事は無いが、今日は兩人ともにお留守に置かせらるるは、あの附子はよく〜大切な物と見えておりやる。」

次「わごりよの言ふ通り、兩人に、お留守に仰(おほ)せつけらるるは、よく〜大事の物と見えておりやる。」

シテ「そりや〜。」(と、飛びのく)

次「これは何事でありやる。」

シテ「あの方から暖かな風が吹いて来たによつて、すは滅却する事かと思うて驚いたよ。」

次「今のは風では無かつたよ。」

シテ「それなればようおりやる。さて某(それ)はあの附子をちと見て置かうと思ふ。

次「はてさてわごりよはむさとした事をおしやる。頼うだ人の仰(おほ)せらるるは、その主が取り扱えば何事も無し、餘人(よじん)が取り扱へばたちまち滅却すると仰せられたによつて、これは要らぬものでおりやる。」

シテ「そなたのおしやるは尤(もつ)もなれども、さりながら自然(ぜん)どなたぞ、そちがところには附子と言ふ物があると開いたがいかやうな物ぢや、と仰(おほ)せられた時、いや何とござるをも存(ぞん)ぜぬと申してはいかがぢや程に、ちよつと見て置かうと思ふ。

次「わごりよのおしやるも尤(もつ)もなれども、あの方から吹く風に當つてさへそのまま滅却すると仰せられた程に、これは無用にさしませ。」

シテ「さればその事ぢや。風に當れば滅却するによつて、風に當らぬやうにこなたから煽ぎながら見ようではないか。」

次「煽(あ)ぎながらな。」

シテ「なか〜。」

grava, ke ni ambaŭ restu hejme por gardi ĝin!

Z: Vi pravas. Tiu akonito estas plej kara, ke ni ambaŭ gardu ĝin!

T: Ve, Danĝere! (Iras al PONTO)

Z: Kio okazis?

T: Vento venis de ĝia direkto! Mi preskaŭ pereis.

Z: Tute ne blovas vento.

T: Do, ni estas sekura. Mi nun volas vidi tiun akoniton.

Z: Kiel absurde vi parolas! Sinjoro diris: Kvankam tute sekura al la mastro, eĉ simpla tuŝo tuj pereigos la aliajn. Tial ne faru absurdaĵon.

T: Kvankam vi pravas, mi ne povus respondi, se oni demandos, kia estas tiu akonito en mia domo. Nepre vidi akoniton mi devas.

Z: Mi bone komprenis vin. Sed, pensu, eĉ vento de ĝia direkto pereigos vin. Tial vi ne povas vidi ĝin.

T: Vento pereigos nin. Ni do povas kontraŭ-ventumi kaj vidi ĝin.

Z: Kontraŭ-ventumi kaj vidi ĝin?

T: Jes, tiel ni povas vidi ĝin!

次「これは一段とようおりやらう。」  
シテ「それならば某が煽がう程に、わごりよ紐(むす)を解かします。」  
次「某の紐を解かう程に、随分煽いでくれさします。」  
シテ「心得た。」  
次「煽げ煽げ。」(さし足で行く)  
シテ「煽ぐぞ〜。」  
次「煽げ〜。」  
シテ「煽ぐぞ〜。」  
次「解くぞ〜。」  
シテ「解け〜。」  
次「解くぞ〜。」(紐を解く)  
シテ「解け〜。」  
次「さあ解いたは。」(と言ひながら元の場所に戻る)  
シテ「出かさしました。ついでに蓋(ふた)をも取らします。」  
次「某が紐を解いた程に、わごりよ蓋を取らします。」  
シテ「それならば身共が蓋を取らう程に、随分煽がします。」  
次「心得た。」  
シテ「煽げ〜。」  
次「煽ぐぞ〜。」  
シテ「煽げ〜。」  
次「煽ぐぞ〜。」  
シテ「取るぞ〜。」  
次「取れ〜。」  
シテ「取るぞ〜。」  
次「取れ〜。」  
シテ「さあ取つたは」(蓋を取り、逃げ戻る)  
次「出かさしました。」  
シ「まづは生類(しやうるい)では無いと見えた。」  
次「それはなぜに。」  
シテ「生類ならばそのまま飛んでも出さうなものぢやが、まづは生類では無いと見えた。」

Z: Bona ideo!  
T: Mi do ventumos dum vi malligos la tinon.  
Z: Mi malligos la tinon dum vi ventumos.  
T: Konsentite!  
Z: Ventumu, ventumu! (Iras štelpaŝe)  
T: Ventumas, ventumas!  
Z: Ventumu, ventumu!  
T: Ventumas, ventumas!  
Z: Malligos, malligos!  
T: Malligu, malligu!  
Z: Malligas, malligas! (Malligas)  
T: Malligu, malligu!  
Z: Jen, mi malligis la tinon! (Reiras)  
T: Bone vi malligis! Nu do vi forigu la kovrilon de la tino.  
Z: Mi ja malligis la tinon. Nun vi forigu la kovrilon.  
T: Mi do forigos la kovrilon. Vi ventumu fortege!  
Z: Konsentite!  
T: Ventumu, ventumu!  
Z: Ventumas, ventumas!  
T: Ventumu, ventumu!  
Z: Ventumas, ventumas!  
T: Forigos, forigos!  
Z: Forigu, forigu!  
T: Forigas, forigas!  
Z: Forigu, forigu!  
T: Jen, mi forigis la kovrilon! (Forigas la kovrilon kaj tuj reiras)  
Z: Bone vi forigis.  
T: Mi povas diri, ke ĝi ne estas vivaĵo.  
Z: Kial vi pensas tiel?  
T: Vivaĵo elsaltus for. Ĝi ne povas esti vivaĵo.

次「その通りでおりやる。」  
シテ「これからとつくりと見ようではな  
いか。」

次「ようおりやらう。」  
シテ「随分煽がしませ。」  
次「ぬかる事ではない。」  
シテ「煽げ〜。」  
次「煽ぐぞ〜。」  
シテ「煽げ〜。」  
次「煽ぐぞ〜。」  
二人「煽げ〜〜。」

シテ「さあ見たは〜。」  
次「何と見さしました。」  
シテ「某は白う、どんみりと見ておりや  
る。」

次「身共は鼠色(ねずみ)にどんみりと見  
ておりやる」  
シテ「さて某(それ)はあの附子をちと食  
ひたうなつた。」

次「はてさて、わごりよはむさとした事  
をおしやる。風に當つてさへ滅却する  
と仰(おほ)せられた物を、何と聊爾  
(りよ)に食はるるものでおりやる。」

シテ「いや〜某は附子に領じられたや  
ら、しきりに食ひたうなつた。いて食  
ふぞ。」

次「これ〜まづ待たしませ。頼うだ人  
のお留守に凶事があつては某(それ)一  
人の迷惑ぢや程に、これは要らぬもの  
でおりやる。」

シテ「いやいや苦しい。放さしませ。」  
次「某のこれにある中はやる事はならぬ。  
要らぬものでおりやる。」

シテ「いや苦しい。放さしませ。」  
次「はてさて要らぬものでおりやる。」  
シテ「放さしませと言へば。」  
次「要らぬものでおりやる。」(と袂を  
持つ)

シテ「へ名残の袖をふり切つて、へ附

Z: Vi pravas!  
T: Nun ni vidu bone.

Z: Jes, ni vidu la enhavon de la tino.  
T: Vi ventumu fortege!  
Z: Mi ne fuŝos la aferon.  
T: Ventumu, ventumu!  
Z: Ventumas, ventumas!  
T: Ventumu, ventumu!  
Z: Ventumas, ventumas!  
A m b a ŭ: Ventumu, ventumu,  
ventumu!

T: Jen, mi vidis! Mi ja vidis!  
Z: Kion vi vidis?  
T: Ion nebule blankan.

Z: Mi ja vidis ion nebule grizan.

T: Nun mi volas manĝi akoniton.

Z: Kian absurdaĵon vi eldiris! Eĉ  
vento de ĝia direkto, Sinjoro diris,  
pereigos vin. Kiel vi povus manĝi  
ĝin senpripense.

T: Jam mi estas tute obsedita de  
akonito. Nepre mi iros kaj manĝos  
ĝin!

Z: Ne iru! Oni riproĉos min, se  
okazos io malbona dum foresto de  
Sinjoro. Ne faru absurdaĵon!

T: Ne gravas! Lasu min iri!

Z: Mi ne lasos vin iri. Ne faru  
absurdaĵon!

T: Ne gravas! Lasu min iri!

Z: Ne faru absurdaĵon!

T: Mi diras: Lasu min iri!

Z: Ne faru absurdaĵon! (Kaptas la  
manikon.)

T: ♪ Forskuinte la manikon, ♪ mi



子の側にぞ寄りける。」(袖を振り放し、腰桶の側へ行く)

次「これはいかな事。たつた今に滅却(めきやく)致すでござらう。さても〜 苦苦(にがにが)しい事でござる。」

シテ(扇を逆さに持ち、附子をすくつてなめ、舌打ちして左の手で頭を打つて坐(す)る)「さあたまらぬは〜」

次「やい〜何としたぞ〜。」

シテ「氣づかひさしますな。うまうてたまらぬ。」

次「何ぢや、うまうてたまらぬ。」

シテ「なか〜。」

次「して何でおりやる。」

シテ「砂糖でおりやる。」

次「何ぢや砂糖ぢや。」

シテ「なか〜。」

次「どれどれ某(それ)もねぶつて見よう。」

シテ「わごりよもなめて見さしませ。」

次(シテの通りなめてみる)「まことこれは砂糖でおりやる。頼うだ人にだまされておりやる。」

シテ「いやなう〜。そなた一人なめずともこちへおこさしませ。(桶を脇座の方に持つていきなめる)さても〜うまい事ぢや。手も離さるる事では無い。」

次「いやなう〜。そなた一人なめずともこちへおこさしませ。」(と言ひながら橋掛かりへ持つて行きなめる)

シテ「これはいかな事。又どちへやら持つていた。(と言ひながら次郎冠者の側へ行く)いやなう〜。そなた一人なめずともこちへおこさしませ。」(舞台の眞中へ持つて行く)

次「又どちへやら持つていた。(とシテの側へ行き)いやなう〜。わごりよ一人なめずともこちへおこさしませ。」

rapidu al akonito!

Z: Kiel terure! Li tuj pereos. Kia malĝojo!

T: (Uzas ventumilon kiel kuleron, klakas per lango, batas la kapon kaj sidiĝas) Toleri mi ne povas!

Z: Kiel vi sentas?

T: Lasu min! Netolereble... bonguste.

Z: Kion vi diris? Netolereble bonguste?

T: Jes, bonguste!

Z: Kio ĝi do estas?

T: Nur sukero!

Z: Ĉu sukero?

T: Jes, sukero!

Z: Ankaŭ mi volas manĝi.

T: Ankaŭ vi povas manĝi.

Z: Vere ĉi tio estas sukero! Ni estis trompitaĵ de Sinjoro.

T: Ne manĝu vi sola. Transdonu ĝin al mi. (Kun la tino iras al WAKIZA kaj manĝas sukeron) Kiel bonguste! Eĉ ripozi mi ne povas!

Z: Ne manĝu vi sola. Transdonu ĝin al mi. (Kun la tino iras al PONTO kaj manĝas sukeron)

T: Kio okazis?! Kien vi formetis la tinon? (Iras al Ziroomkazya) Ne manĝu vi sola. Transdonu ĝin al mi. (Kun tino iras al la mezo de la podio)

Z: Kien vi formetis la tinon? (Iras al T) Ne manĝu vi sola. Transdonu ĝin al mi.

シテ「これはいかな事。又どちへやら持つていた。いやなう〜。そなた一人なめずともこちへおこさしませ。」

次「こちへおこさしませ。」

シテ「こちへおこさしませ。」

二人「こちへおこさしませ〜〜。」(兩人競ひ合ひ中を見て)

シテ「ほう。よい事をさしました。皆(みな)になつておりやる。」

次「まこと皆になつておりやる。」

シテ「頼うだ人のお歸りなされたならば、眞直(まっ)ぐに申し上げう。」

次「わごりよがねぶり初(そ)めて置いて、某の眞直ぐに申し上げる。」

シテ「これは戯(ぎ)れ事(じ)でおりやる。さて何としたものであらうぞ。」

次「何としたならばよからうぞ」

シテ「まづ下におりやれ。」

次「心得た。」

シテ「さてなう。頼うだ人のお歸りなされたならば、何と申し上げたものでおりやらうぞ。」

次「されば何と申し上げたならばようおりやらうぞ。わごりよ分別(ぶん)をして見さしませ。」

シテ「いやなう〜。よい事を思ひ出した。あの床(と)の掛け物を破らしませ。」

次「はてさてわごりよはむかつな事を言ふ人ぢや。あの附子を食ふさへあるに、何と御祕藏の掛け物が破らるるものぢや。」

シテ「いや〜言譯(いひ)の種になる程に平(ひら)に破らしませ。」

次「何ぢや言譯の種になる。」

シテ「なか〜。」

次「それならば破らいで何とするものぢや。さら〜〜。」

シテ「ほう、よい事をさしました。頼う

T: Kio okazis?! Kien vi formetis la tinon? Ne manĝu vi sola. Transdonu ĝin al mi.

Z: Transdonu ĝin al mi.

T: Transdonu ĝin al mi.

Ambaŭ: Transdonu ĝin al mi. Transdonu ĝin al mi. (Rigardas en la tinon)

T: Vi ja faris: La tino estas tute malplena!

Z: Vere malplena!

T: Kiam revenos Sinjoro, senkaŝe mi diros, kion vi faris.

Z: La unua manĝis vi mem! Mi diros ĉion al Sinjoro!

T: Mi ŝercis! Ni tamen devas iel elturniĝi.

Z: Kiel ni elturniĝu?

T: Antaŭ ĉio ni sidiĝu.

Z: Jes, ni sidiĝu.

T: Ni devos iel senkulpigi nin, kiam revenos Sinjoro.

Z: Jes, ni devos iel senkulpigi nin. Eble vi havas bonan ideon.

T: Jes, mi havas bonan ideon: Volu disŝiri tiun kakemonon en la tokonomo.

Z: Ha, vi diras absurdaĵon! Aldone al formanĝo de akonito, kiel mi povus disŝiri la kakemonon, la ŝatatan trezoron de Sinjoro!

T: Tio estas por senkulpigo! Nepre disŝiru.

Z: Ĉu por senkulpigo?

T: Jes, por senkulpigo!

Z: Mi do volonte disŝiru. Riĉ-raĉ, riĉ-raĉ!

T: Vi ja faris! Kiam revenos Sinjoro,

だ人のお歸りなされたならばそのまま  
申し上ぐるぞ。」

次「わごりよが破れと言うて破らせて置  
いて某の眞直ぐに申し上ぐる。」

シテ「これも戯れ事でおりにやる。」

次「それなればようおりにやる。」

シテ「さてあの臺子(だいす)臺天目(だいてんもく)をも打ち割らしませ」

次「いやなう。わごりよは氣でも違ひは  
せぬか。あの御祕藏の掛け物を破るさ  
へあるに、何とあの臺子臺天目が打ち  
割らるるものか。」

シテ「いや〜。これも言譯の種になる。  
某も手傳(てでん)ふ程に打ち割らしま  
せ。」

次「それならば打ち割らいで何とするも  
のぢや。」

シテ「まづこの天目から、打ち割らう。」

次「ようおりにやらう。」

シテ「からりちん。」

次「ちんからりん」(二人笑う)

シテ「微塵(みじん)になつておりにやる。」

次「その通りでおりにやる。」

シテ「臺子をも踏み碎(くだ)かう。」

次「ようおりにやらう」

二人「めり〜。めり〜〜。めり。」  
(笑)

シテ「微塵になつておりにやる。」

次「その通りでおりにやる。」

シテ「頼うだ人のお歸りなされたならば、  
さめざめと泣いてみよう。」

次「泣けば濟む事か。」

シテ「なか〜。濟む事ぢや。やう〜  
お歸りなされう程にこれへ寄つてお  
りやれ。」

次「心得た。」

主「ゆるりと遊山(ゆうざん)を致(いた)いて  
ござる。急(いそ)いで宿(やど)へ罷(ま)  
り歸らうと存(ぞん)ずる。兩人の者ど

senkaŝe mi diros, kion vi faris.

Z: Vi mem ordonis! Mi diros ĉion al  
Sinjoro!

T: Mi ŝercis!

Z: Ne ŝercu!

T: Nun, volu disrompi ankaŭ tiun  
tason de *TENMOKU* KUN SUBPLADO.

Z: Ha, vi diras absurdaĵon! Aldone  
al disŝiro de la trezora kakemono,  
kiel mi povus disrompi la tason de  
*TENMOKU* KUN SUBPLADO!

T: Ankaŭ tio estas por senkulpigo!  
Ĉifoje mi helpos vin; ni kune  
disrompu ilin.

Z: Mi do volonte disrompu!

T: Unue disrompu la tason de  
*TENMOKU*.

Z: Konsentite!

T: Krak, krak!

Z: Krak, krak! (Ambaŭ ridas)

T: Tute frakasita!

Z: Jes, tute!

T: Nun ni distretu ankaŭ la breton.

Z: Konsentite!

Ambaŭ: Krak, krak! Krak, krak!  
(Ili ridas)

T: Tute frakasita!

Z: Jes, tute!

T: Kiam revenos Sinjoro, ni ploru  
kun senĉesaj larmoj.

Z: Ĉu larmoj utilos?

T: Jes, utilos multe. Baldaŭ li revenos.  
Ni sidiĝu ĉi tie.

Z: Konsentite!

Mastro: Sufiĉe longe mi ekskursis.  
Nun mi rapidu hejmen. Min  
atendas la servistoj. Hej,

もが待ちかねて居るでござらう。やい  
〜太郎冠者次郎冠者。戻つたぞ戻つ  
たぞ。」

シテ「お歸りなされた。泣け〜。」

次「心得た。」(二人泣く)

主(舞臺へ入り、兩人の泣いてゐる體  
(てい)を見て)「これはいかな事。某の  
戻つたと言ふ事を聞いたならば、その  
まま飛んでも出さうなものぢやが、さ  
め々 と泣くは何事ぢやぞ。」

シテ「そなた申し上げさしませ。」

次「わごりよ申し上げさしませ。」

主「どちらからなりとも早う言はぬか。」

シテ「それならば私の申し上げませう。  
お留守になつてござれば餘り淋しうな  
りましたによつて、次郎冠者が相撲  
(すま)を取らうと申します程に、私  
はつひに取つた事が無いと申してござ  
れば、是非ともにと申して腕(かひ)を  
取つて引き立てまするによつて、それ  
が餘り迷惑さのままあの床の掛け物に  
取りついてござれば、あの如(ごと)く  
になあ。」

次「なか〜」

二人「裂けましてござる。」(泣く)

主「これはいかな事。某(それ)の祕藏の  
掛け物をあの如くに引き裂いて、ただ  
置く事では無いぞ。まだあらば早(はや)  
う言へ。」

シテ「それより右左へ取つて引き廻し、  
あの。臺子臺天目の上へ、ずでいどう  
と投げられてござるによつて、あの如  
くになあ。」

次「なか〜。」

二人「打ち割れましてござる。」(泣く)

主「さても〜憎い奴ぢや。臺子臺天目  
をもあの如くに打ち割つて、ただ置く  
事では無い。まだあらば早う言へ。」

*Tarookazya, Zirookazya, mi estas  
hejme! Mi estas hejme!*

T: Li revenis! Ploru, ploru!

Z: Konsentite! (Ili ploras)

M: (Iras en podion kaj vidas, ke la  
servistoj ploras) Kio okazis? Vi  
ne venas renkonti min, sed nur  
ploras!

T: Vi klarigu ĉion al Sinjoro.

Z: Ne mi, sed vi klarigu.

M: Iu ajn el vi tuj klarigu!

T: Mi do klarigos: Dum via foresto ni  
sentis solecon. *Zirookazya* proponis  
lukti sumoon. Mi ne scipovas lukti  
sumoon kaj hezitis. Sed *Zirookazya*  
kaptis min ĉe brako kaj starigis. Mi  
faletis, kaptis tiun kakemonon en  
la tokonomo kaj tiel...

Z: Vere tiel...

Ambaŭ: Disŝiris ĝin! (Ploras)

M: Ha, vi disŝiris mian ŝatatan  
kakemonon! Neniam mi pardonos  
vin! Ĉu vi havas ankoraŭ alian  
kulpon?

T: Li ĉirkaŭtenis kaj ĵetis min sur la  
tason de *TENMOKU SUR TABLETO*.  
Kaj tiel...

Z: Vere tiel...

Ambaŭ: Disrompis ĝin! (Ploras)

M: Vere malamindaj! Vi ja disrompis  
mian ŝatatan tason de *TENMOKU  
SUR TABLETO*! Ĉu vi havas  
ankoraŭ alian kulpon? Neniam mi  
pardonos vin!

シテ「この上は生(い)けては置かせられまいと存(ぞん)じて、附子を食うて死なうと思つてなあ。」

次「なか〜。」

シテ「へ一口(ひとくち)食へども死なれもせず。」

次「へ二口食へどもまだ死なず。」

シテ「へ三口四口。」

次「へ五口。」

二人「へ十口(とち)餘り皆(みな)になるまで食うたれども、死なれぬ事の出たさよ。あら頭(かし)かたや侯(きさぎ)。」


主(肩を脱ぎ、扇子で打つ)「なんのおのれ、頭かたや。」

二人(逃げ入る)「眞平(まら)許(ゆる)いて下されい〜。」

主(追い入る)「あの横着者(おうちや)。人たらし。どちへ行くぞ。捕へてくれい。やるまいぞ〜。」 (終わり)

※床の掛け物：床の間の絵や書。

※台天目(だいてんもく)：天目台がついた天目茶碗。黒い鉄釉をかけた陶器。



附子 Akonito

T: *Îar ni estis certaj, ke vi ne lasos nin vivaj, ni volis morti kaj manĝis akoniton.*

Z: *Jes, ni manĝis akoniton.*

T: *♪ La unua manĝo ne mortigis nin.*

Z: *♪ La dua manĝo ne mortigis nin.*

T: *♪ La tria, la kvara,*

Z: *♪ La kvina manĝo...*

Ambaŭ: *♪ Eĉ la deka manĝo ne mortigis nin, sed malplenigis la tinon. Kaj restas ni tute sanaj.*

M: *(Nudigas la ŝultron kaj batas per ventumilo) Vi restas tute sanaj?!*


Ambaŭ: *Pardonon ni petas! (Ripetas pardonpeton kaj forkuras)*

M: *Kiaj ruzuloj! Trompuloj! Kien vi iras? Kaptu ilin! Mi ne pardonos vin! Mi ne pardonos vin! (fino)*

※ *Kakemono en tokonomo: Bildo aŭ kaligrafajo en ornama niĉo.*

※ *TENMOKU KUN SUBPLADO: Nigra te-taso kun fera glazuro kun Subplado.*

## Vesto de servisto



肩衣(かたぎぬ)は袴の外側に垂らす。

袴(はかま)は短い。

## 棒縛 (ぼうしぼり)

狂言記拾遺卷三の一

登場人物: 主、太郎冠者、次郎冠者 (ㄥ)

主「罷出 (まいり) たる者は此当 (この) りに住居 (すま) 致す者でござる。それがし今日は (に) 去方 (さかた) へ用事有て参る。それにつき、身 (み) どもの遣ふ兩人の者共 (もの) が、留主になれば酒を盗ふで食 (く) ろふ。憎い事で御座る。今日は思案の致した事がござる。酒を得 (え) 飲まぬやうに致しやうがござる。やい、太郎冠者有 (あ) か。」

太「はあ、御前 (おま) におります。」

主「汝 (なん) を呼び出 (い) す事、別 (ち) の事でない。今日は (に) 去方へ参る程 (ほど) に、よふ留主をせい。」

太「畏 (かしこ) てござる。」

主「それにつき、留主になれば次郎冠者が酒を盗ふで飲むと聞いた。何とぞして飲まぬやうに異見 (いけん) のせふと思ふが何とあろふ。」

太「さればで御座る、御留主になれば酒を食べます。私がいゝ異見致せど聞きませぬ。身共 (みど) の存 (ぞん) ますは、きやつが頃日 (ころ) 棒を稽古致して遣 (つか) ます程に、唯今 (いま) これへ呼び出 (い) し棒をつかはしてみさせられ、すきを見て棒縛りになされましたら、よふござりましょ。」

主「是 (これ) はよひ事を思ひ寄つた。それなら兩人して捕 (と) 糸棒縛りに致そふ。呼び出 (い) せ。」

太「畏 (かしこ) てござる。」

主「かならずぬかるな。」

太「心得 (こころえ) ました。やい、次郎冠者、召すは。」

シテ「何と、召すか。心得た。はあ、御

## Baston-Ŝnurado

el “Kyoogenki Syuui” vol. 3.1

tradukis SIMATANI Takesi, 1995

Mastro: Mi estas loĝanto en ĉi tiu loko. Hodiaŭ pro iu afero mi devas iri el la domo. Miaj servistoj *Tarookazy* kaj *Zirookazy* ĉiam ŝtelas sakeon dum mia foresto. Kiaj kanajloj ili estas! Mi havas bonan ideon, por ke ili neniel povu trinki sakeon. (Laŭte) *Tarookazy*, kie vi estas?

Tarookazy: ♪ Jen Antaŭ vi.

M: Mi vokis vin ĉar hodiaŭ mi iros el la domo pro iu afero. Vi, do, gardu la domon dum mia foresto.

T: Laŭ via ordono!

M: Oni diras, ke *Zirookazy* ĉiam ŝtelas sakeon dum mia foresto. Kiel mi punu lin? Ĉu vi havas bonan ideon?

T: Fakte li ŝtelas sakeon dum via foresto. Kvankam mi forte riproĉis lin, li ne sekvis miajn vortojn. Mi havas bonan ideon, Sinjoro! Lastatempe li trejnas sin en batalarto kun bastono. Voku kaj ordonu lin prezenti lian bastonarton. Dum tio ni kune ŝnuru lin al la bastono.

M: Bona ideo! Ni kune ŝnuru lin al la bastono. Tuj venigu lin.

T: Laŭ via ordono!

M: Ne fuŝu la aferon!

T: Certe ne! *Zirookazy*, La Sinjoro vokas vin! Rapidu al li.

*Zirookazy*: Ĉu li vokis min? Tuj mi

前におります。」

主「早かつた。汝を呼び出す事、別(べ)の事でない。今日は(こゝろ)去方へ用事有て参る。よふ留主をせい。」

シテ「畏(かしこ)てござる。御留主は気づかひなされますな。たとへ五人や七人盗人が参つたと申(まう)て、私壱人しても防ぎますぞ。」

主「それは頼もしい。それにつき、頃日聞けば汝は棒を遺ふと聞いた。いつの間に稽古した。少(すこ)、見たい程に遣(つか)ふて見せい。」

シテ「いや、それは思ひも寄りませぬ。棒を遺ふ事は存(ぞん)ませぬ。」

太「いや是(これ)へ、隠すな。頼ふだ御方によふ御存知(ごんぢ)じや。」

シテ「扱(さ)は汝が申上げた物であるふ。私も遣ますと申程の事ではござりませぬ。此中(こちゅう)少(すこ)稽古致しました、遣ふて御目にかけてましょ。」

主「いかにもよかる。遣ふて見せい」

シテ「畏(かしこ)て御ざる。先(まづ)此(こ)棒と申(まう)物がかふ持(も)て出ますから、はや心得が御ざる。先(まづ)から打て参るを、かふ致して止めます。扱(さ)向かふの者が引(ひ)ます。すぐに取直し、かふ致して、これで胸を突きます。」

主「尤(もつ)よい手じや。」

シテ「また夜道と申が無用心な物でござる。其時(そのとき)には後(うしろ)から打て参るも知れませぬによつて、とかく後を用心致して此ごとくにして参れば、先(まづ)後(うしろ)の分に氣遣(きづ)はござらぬ。」

主「太郎冠者、ぬかるな。」

太「心得ました。餓鬼(がき)め。」

シテ「これは何とする。」

主「をのれは憎いやつの、よふ留主には

iros! Jen, *Zirookazy* estas antaŭ vi.

M: Bone, ke vi tuj venis. Mi vokis vin ĉar hodiaŭ mi iros el la domo pro iu afero. Vi, do, gardu la domon dum mia foresto.

Z: Laŭ via ordono! Estu trankvila pri la domo. Mi sola forigos ŝtelistojn, eĉ se ili venos kvinope aŭ sepope!

M: Bone, mi ĝojas, ke vi bone gardos la domon. Oni diris, ke vi trejnas vin kun bastono. Mi volas vidi, kiel vi uzas bastonon.

Z: Ha, mi ne povas uzi bastonon, Sinjoro!

T: Ne kaŝu, ne kaŝu. Ĉion scias Sinjoro!

Z: Certe vi diris al Sinjoro! Kvankam ankoraŭ mallerta, lastatempe mi iom trejnis min. Nun mi uzos bastonon antaŭ vi.

M: Bone. Tuj uzu la bastonon.

Z: Laŭ via ordono! Jen la bastonon oni devas teni tiel. Se iu atakas min de antaŭe, mi defendas ĉi tiel. Li retiros sin. Tuj mi iros antaŭen tiel kaj batos la bruston.

M: Bona taktiko!

Z: Plej danĝere estas nokte. Oni atakos min de la dorso. Tiam mi gardos min ĉi tiel. Nun estas neniam ĝeno ĉe la dorso. Mi povas marŝi trankvile.

M: *Tarookazy*, jen!

T: Mi ne fuŝos! Mi kaptis vin!

Z: Kial vi kaptis min!?

M: Kia fripono vi estas! Vi ŝtelis

酒を盗ふで飲みおる。かふしておいた  
がよい。」

太「扱(ぎ)も〜よいなりの。」

シテ「そちは聞こへぬ者じや。よふだま  
した。」

主「どつこい、をのれもやる事ではない  
ぞ。」

太「私は何も存(ぞん)ませぬ〜。」

主「をのれも一所になつて酒を飲みおつ  
て、存(ぞん)ませぬとは。さあまづ是  
(ね)でよい。其(その)なりで二人共に  
よふ留主せい。」

二人「是(これ)では留主はなりますまい、  
盗人が入つたらどうもなりますまい。  
解いてをかせられ。」

主「いや〜、そのなりで防げ。よふ留  
守せい。」

二人「申し〜。これ〜、是(これ)は  
いかな事、はやどちやらござつた。」

シテ「やい〜、是(これ)は何とも迷惑  
な事じやな。」

太「されば〜、みな是(これ)は汝が酒  
を飲ふだゆへじや。」

シテ「それは汝も同じ事じや。やあ、何  
と思ふぞ、此(こゝ)やうにしていれば、  
いつもより取分(とけ)酒が飲みたいな  
あ。」

太「なか〜、身どもも其(その)通りじや。  
何とぞ蓋(ふた)を開(あ)け汲(く)みさ  
へしたら飲もふが。やあ、見れば、そ  
ちが手先(てき)が叶(かな)ふは。蓋を  
取れ。」

シテ「誠(まこと)に身共(みども)はまだ手先  
は叶ふ。蓋を取ろふか。さあ、まんま  
と蓋を取つたは。汲もふか。これに盃  
が有(あ)。汲んで先(まづ)身どもが飲  
もふ。これはいかな事。飲もふと思ふ  
ても口が届かぬ。気の毒な。何とせふ  
なあ。」

太「やあ、思ひ付(おもひ)た。先(まづ)それ

sakeon dum mia foresto. Jen tio  
estas la puno!

T: Ha, kiel bele vi aspektas!

Z: Kiel senkora vi estas! Vi perfidis  
min.

M: Mi kaptis ankaŭ vin!

T: Mi kulpas neniom!

M: Ankaŭ vi kulpas, ĉar vi du kune  
trinkis sakeon. Bone mi ŝnuris vin  
ambau! Mi lasos vin tia, dum mi  
forestos. Bone gardu la domon!

Ambaŭ: Kiel ni povus gardi la domon  
ŝnuritaj? Nenion ni povos, kiam  
venos ŝtelistoj! Malŝnuru nin!

M: Tiaj vi batalu kontraŭ ili! Bone  
gardu la domon.

Ambaŭ: Ni petas, Sinjoro! Sinjoro!  
...Li jam foriris ien.

Z: Hej, *Tarookazya*, en granda ĝeno  
ni estas!

T: Certe ĝene. Ĉio ĉi okazis pro tio,  
ke vi trinkis sakeon.

Z: Ankaŭ vi ja trinkis! Kvankam li  
ŝnuris nin, por ke ni ne trinku, des  
pli forte mi sopiras al sakeo!

T: Ankaŭ mi sopiras al sakeo. Se mi  
povus malfermi la poton, ni povus  
trinki... Ha, vi povas iom movi la  
fingrojn! Provu malfermi!

Z: Vere mi povas movi la fingrojn!  
Mi malfermos la poton. Jen mi  
malfermis. Mi verŝu sakeon. Ĉi  
tie estas pokalo. Unue mi verŝu  
kaj trinku... Ho, ve! Mia buŝo ne  
atingas la pokalon. Bedaŭrinde!  
Kion mi faru?

T: Mi havas bonan ideon. Lasu min



は身共に飲ませ。」

シテ「心得た、さあ飲め〜。」

太「飲ふだは〜。扱(さ)も〜此(こゝ)体で飲めばいつ〜より別而(べつ)むまい事じや。どうぞして、そちにも飲ましたいが。思ひ付けた。又酒を汲(く)んで身どもに持たせ。」

シテ「心得た。さあ〜持て。」

太「持つたぞ〜。これへ寄つて飲め。」

シテ「まことにこれでは飲まるゝは。飲むぞ〜。扱(さ)も〜むまい事かな。またそちに差そふ。先(ま)ちと下にいて謡(うた)はふ。」

太「一段よかる。」

二人「へざざんざあ浜松の音はざざんざあ。」

シテ「扱(さ)も〜、おもしろい。さあ〜、又身共(みども)食(た)べふ。もはや一息には飲まれぬ。下に置かふ。やい〜太郎冠者、受け持つた。肴に何ぞ小舞(こま)を舞へ。」

太「いや、此なりでは舞われぬ。」

シテ「どふなりと心持ち斗(ばかり)舞へ」

太「それなら何も慰(なぐ)みじや。舞はふ。(小舞)へ番匠屋(ばんじや)の娘子(むすめ)の、召(め)たりや帷子(かたびら)※、肩にかんな箱、腰に小のみ小手斧(こんよ)、さいづちやのこぎり、忘れたりや墨差(すみ)、裾(す)にかんな屑(くず)吹きや散らした、ぱつと散らした、お方に名残(なご)が惜しけれどよ、浦浜の手操(てら)舟が急ぐ程にの、やがて来(か)ふぞほい。」

シテ「糸いやあ。」


二人「へざざんざあ浜松の音はざざんざあ。」

シテ「さあ〜、またわごりよ飲め〜。先(ま)ゆるりと飲ましめ。」

太「やい〜次郎冠者、身共も受け持つ



trinki de la pokalo.

Z: Bone. Unue vi trinku.

T:  Mi trinkis bone! ...Bona sakeo! Des pli bone, ĉar mi estas ŝnurita. Estus bone, se ankaŭ vi trinkus! Ha, mi havas bonan ideon! Plenigu kaj transdonu la pokalon al mi.


Z: Konsentite!... Jen prenu la pokalon.

T: Mi kaptis la pokalon. Nun venu kaj trinku de miaj manoj.

Z: Ha, bona ideo! Certe mi povos trinki! Jen mi trinku!  ...Tre bona sakeo! Jen mi verŝu por vi. (T  Nun ni sidiĝu kaj kantu.

T: Tre bone!

Ambaŭ: (Kanto)Plaŭdas ondoj en Hamamatu.

Z: Amuze, tre ameze! Nun mi trinku.  Mi ne povis trinki per unu tiro. Mi metu pokalon portempe. Hej, *Tarookazy*, por amuzo: Dancu por mi.

T: Mi ne dancos kun ŝnuritaj manoj.

Z: Dancu iel ajn!

T: Do, mi dancu por amuzo. (Danco kun kanto) La filino de ĉarpentisto portis Katabira ※, keston de rabotilo, ĉizileton, hakileton, maleon kaj segilon. Ĉu ŝi lasis tuĉspatelon? Rabotaĵo restis ĉe basko de ŝia kimono. Mi volus resti ĉe ŝi. Sed rapidas la ŝipo kun mi de la bordo. Iam mi revenos al ŝi.

Z: Bone, bone!

Ambau: (Kanto)Plaŭdas ondoj en Hamamatu.

Z: Bone, bone! Nun vi trinku denove. Trinku senĝene.

T:  Hej, *Zirookazy*, mi ja dancis.

た。肴に舞(ま)を舞へ。」  
シテ「それなら、いまの返しに舞はふか」  
太「よかる。舞へ〜。」  
シテ「(小舞)へ十七八は、竿に干した  
細布。取りよりやいとし、たぐりより  
やいとし。糸より細い腰をしむればい  
(三つ拍子ありて、)へたんとなをいと  
し。」

太「鬻いやあ〜。扱(さ)も〜おも  
しろい事かな。もはやいかふ酔ふた  
は。」

シテ「さあ〜、先(ま)盃をまん中に  
置いて謡わふ。」

二人「へ兵(つわ)の交はり、頼み有(あ)  
中の酒宴かな 扱(さ)も〜おもしろ  
い事かな〜。」

主「両人の者共を留主において御ざる。  
何としておる存(ぞ)ぜぬ。急(いそ)  
で帰らふ。是(れ)はいかな事、酒盛  
りの音がする。謡(うた)を謡(うた)ふ。  
あのごとくに縛つておいてもまだ酒を  
飲みをる。憎いやつかな。」

シテ「やい〜、あれを見よ。頼ふだ人  
の影が盃の中へ映(うつ)る。不思議な  
事の。身共(みども)の存(ぞん)るは、し  
わい人じやによつて、此(こ)やうに  
縛つておいてもまだ酒を盗んで飲むか  
と思はるゝ執心が是(れ)へ映る物で  
ある。」

太「そふである。」

シテ「いざ此(こ)様子を謡に謡はふ。」

太「一段よかる。」

シテ「へ月は一つ影は二つ。」

二人「へ満(み)塩の夜の盃に主(しゆ)  
を乗せて主とも思はぬ内の者かな。」

主「何じや、主とも思はぬ。餓鬼(がき)め、  
やるまいぞ。」

太「あゝ、許させられ〜。」

主「をのれまだそこにをるか〜。」

Ankaŭ vi dancu!

Z: Do, ankaŭ mi dancu!

T: Bone, bone!

Z: (Danco kun kanto) Deksep aŭ  
dekok jarojn ŝi havas. Sveltas ŝi  
kiel mallarĝa vesto sur stango.  
Sopiras al ŝi, mi sopiras al ŝi. (Tri  
taktoj da ripozo) Plej forte sopiras  
mi.

T: Bone, bone! Kiel amuza festeno!  
Tro ebria mi jam estas!

Z: Jam lasu la pokalon meze. Ni  
kantu kune!

Ambaŭ: (Kanto) Amikeco de soldatoj,  
festeno de fideluloj... Amuze, plej  
amuze!

M: Mi lasis la servistojn hejme. Kion  
ili nun faras? Mi rapidu hejmen...  
Kiaj sentaŭguloj! Jen ili festenas!  
Ili kantas laŭte! Ili trinkis sakeon,  
kavankam mi ŝnuris ilin! Kiel  
malamindaj ili estas!

Z: Hej, vidu! En la pokalo jen aperis  
la bildo de Sinjoro. Mirinda afero!  
Ĉar li estas tro avara kaj timas, ke  
ni ŝtelas lian sakeon, mi pensas, lia  
obsedo aperis en la pokalo.

T: Certe vi pravas.

Z: Ni kantu pri tiu fenomeno.

T: Bona ideo!

Z: (Kanto) Unu luno kaj du bildoj.

Ambaŭ: (Kanto) Sur pokalo en plena  
nokto aperis Sinjoro ignorata.

M: Ĉu Sinjoro ignorata?! Sentaŭguloj!  
Mi ne pardonos vin!

T: Ve! Pardonu min! Pardonu min!

M: Ankoraŭ vi restas ĉi tie!

シテ「あゝ、許させられ〜。」

主「やるまひぞ〜。」

(終わり)

※帷子(かたびら): 夏に着る絹や麻の単衣(ひとえ)。

※〜: 【お返し、くの字点(横書き)】

Z: Ve! Pardonu min! Pardonu min!

M: Mi ne pardonos vin!

(fino)

※ Katabira: japana vesto en somero

## 居杭(いぐひ) 諸流

登場人物: 居杭、亭主、算置(さんおき)

居杭(縞(ま)熨斗目(のめ)、狂言袷(かみ)、腰帯(こしおび)。懐(ぶと)に頭巾(ずんき))「これはこの邊(あた)りで名をば居杭と申す者でござる。ここに心安うお目をかけさせらるるお方がござるが、これへ何時参つても、居杭よう來たとあつて、そのままつむりをはらせらるるによつて、それが餘(あま)り迷惑さのまま、この中(ちゆう)清水(きみず)の觀世音へ立願(りかん)を結(むす)んでござれば、満(み)ざる曉(あき)この頭巾のやうな物を下(くだ)されてござる。これが餘り不思議にござる程に、今日は(にった)あれへ参り様子を見ようと存(ぞん)じて罷(ま)り出た。まづそろり〜と参らう。(舞臺を廻る)何とこの頭巾を被い(か)でござらうならば、つむりをはらせられまいと思召(おぼ)すお心も出来るか、参つたならば様子が知るるでござらう。いや参る程にすなはちこれぢや。物まう案内まう。御内(おうち)にござりまするか。」

亭主(段(だん)熨斗目(のめ)、長袷(かみ)、小刀(こがな)。扇(あふぎ))「いや表に物まうとあるが。誰も出ぬかやい。案内とは誰(た)そ物まうとは。」

## Igui (laŭ kuranta skolo)

tradukis SIMATANI Takesi 1995

Igui: (Kun kufo en la sino) Mi estas Igui, loĝanto en ĉi tiu loko. Mi konas Sinjoron, kiu ĉiam favoras min. Kiam ajn mi vizitas lin, li bonvenigas kaj... tuj frapas min sur la kapo. Por eviti la ĝenon mi pri-preĝis al Avalokiteŝvaro en la templo Kiyomizu. Post la difinita tempo de preĝado, en la aŭroro Li aperis kaj donis al mi ion similan al kufo. (Igui elprenas kaj rigardas ĝin) Mi ĝojas pro la Miraklo, kaj nun volas viziti la Sinjoron por vidi la efikon de la kufo. Nu, mi iru senhaste. (Igui rondiras en la scenejo.) Ĉu la Sinjoro jam ne volos frapi mian kapon, se mi portos la kufon? Ĉio estos klara, kiam mi vidos lin. Ha, mi jam atingis lian domon! (Laŭte) Saluton, Sinjoro! Saluton! Ĉu vi estas hejme, Sinjoro?

Mastro: Oni vokas min ekstere. Ĉu neniŭ akceptas lin? Kiu salutas min?

居杭「私でござる。」

亭主(扇(あふ))を開き、居杭の頭を叩(た)く「えい居杭ようこそおりやつたれ」

居杭「この中(ぢゆ)は久(ひき)しうお見舞(みま)も申しませぬが、お變りなさる事もござりませぬか。」

亭主「なかへ。變る事も無い。この中は久しう見えなんだによつて、今日は(こった)人をもやらうかなどと思うてゐるところへ、(頭を叩く)まづはようこそおりやつたれ。」

居杭「さればそのお事でござる。この間久しう参りませぬを定めて不審に思召(おぼ)しませうが、いつ参つても今の如(ごと)くにつむりをはらせらるるによつて、脇から人のごらうじられて、あの居杭は科緩愈(とがくわい)でもして打擲(ちやく)に逢ふ事かと思召(おぼ)す、褒貶(ほう)の程(ほど)が恥かしさのまま、それゆゑ伺候(しご)致しませぬ。つむりさへはらせられずは、不斷お前(ま)に詰めてなりとも居(お)りませう。」

亭主「それはわごりよの量見が悪い。かうはる(頭を叩く)を憎うてはるでは無い。可愛いが餘つてはる(頭を叩く)程に、な構へて心にかけてその。(居杭は頭巾(ずん)を出して被る)居杭、居杭、居杭。(左右中と伸び上(あ)つて見る)今までこれに居つたが、どちへ参つた事ぢや知らぬ居杭居杭居杭。」

居杭「さてもへ奇特(きど)な事かな。(橋掛りの一の松に行く)この頭巾を被いたれば、えお見やらぬ。ちと取つて見ませう。」(頭巾を取り、後ろに隠し、舞臺に戻る)

亭主「えい居杭。どちへおりやつた。」

I: Estas Mi, Sinjoro!

M: (Frapas Igui sur la kapo) Ha, Igui! Mi tre ĝojas, ke vi venis!

I: Pardonu, Sinjoro, ke longe mi ne vizitis vin. Kiel vi fartas, Sinjoro?

M: Mi fartas tre bone. Dankon! Pro via longa foresto mi volis hodiaŭ sendi iun voki vin. Mi bonvenigas vin! (Frapas Igui sur la kapo)

I: Eble vi demandus, Sinjoro, kial mi longe ne vizitis vin. La kaŭzo estas tio, ke vi frapas min sur la kapo ĉiufoje, kiam mi vizitas vin. Mi timis, ke oni prenos min batata pro ia kulpo aŭ eraro. Pro mia honoro mi ne povis viziti vin, Sinjoro. Se vi ne frapos min, mi eĉ deĵoros ĉiutage antaŭ vi.

M: Ha, vi eraras! Mi tiel frapas (Frapas sur la kapo) vin ne pro malamo, sed pro favoro mi frapas. (Frapas). Tial ne ĝenu vin pro frapo. (Igui surmetas la kufon. Mastro ĉirkaŭ-rigardas sur la pied-pintoj) Igui, Igui, Igui! Li ĵus estis ĉi tie. Kien li foriris? Igui, Igui, Igui!

I: Kia mirindaĵo! (Igui iras al la ponto ĝis la unua pino) Kun la kufo mi fariĝas nevidebla! Nu, mi forprenu ĝin. (Igui forprenas kaj kaŝas la kufon malantaŭ sin. Kaj li reiras.)

M: Hej, Igui, kie vi estis?

I: Oni vokis min de ekstere.

居杭「人が逢はうと申したによつて、表へ參つてござる。」

亭主「いかに人が逢はうと言うたればとて、今來て置いて出ると言ふ事があるものか所詮(しせん)わごりよを端近(はしか)に置くによつての事ぢや。かう奥へ通らしませ。」

居杭「いやこれがようござる。」

亭主「平(ひら)にかう通らしませと言へば」

(居杭を地謡座(ぢたいざ)の方へ入れる)

居杭「あれがようござつたものを。」

亭主「この中(ちゆう)は戀に(頭を叩く)させたによつて、おりやつたこそは(頭を叩く)幸(さい)ひなれ、五日も十日も(頭を叩く)留めて置いて、いなす事では無いぞいやい(頭を叩く)

居杭「おう又いねと仰(おほ)せられい。參つたこそ幸ひなれ、五日十日の事はさて置きまして三十日も五十日もお側(わき)に居(お)つて、なかへ歸る事ではござりませぬ。」

亭主「おう又いなうと言ふて(頭を叩く)お見やれ。來たこそは(頭を叩く)幸ひなれ三十日五十日の事はさて置き、一年が二年も(頭を叩く)留めて置いて、なかへ歸す事では(頭を叩く)無いぞいやい。(居杭は頭巾を被る)居杭居杭居杭。はて合點(がんで)の行かぬ事ぢや。今までこれに居つたが。居杭居杭居杭。(正面へ出て居杭と向ひ合ふ。居杭は左の人さし指で、自分の鼻の頭を指す)これは不思議な事とござる。居杭、居杭、居杭。どちへいた事ぢや知らぬ。」

居杭(脇柱(わきば)の方へ移る)「さてもへ奇特(きど)な事かな。この頭巾を被いで見えぬとあるは、不思議な事とござる。これと申すも常常(つね)清水(きよ)の觀世音(かんぜ)を信仰致すゆゑに、その御利生(ごりし)とござらう

M: Ne iru for, eĉ se oni vokus vin. Ha, mi eraris resti ĉe la enirejo. Ni iru en la internan ĉambron.

I: Sufiĉas ĉe la enirejo.

M: Nepre iru! (M ŝovas Igui al ZIUTAIZA)

I: Estus bone ĉe la enirejo.

M: Mi atendegis vin sopire. (Frapas) Se vi venis fine, (Frapas) mi ne for-permesos vin (Frapas) eĉ kvin tagojn, eĉ dek tagojn! (Frapas)

I: Se mi venis unu fojon, ne nur kvin aŭ dek tagojn, sed eĉ 30 tagojn, eĉ 50 tagojn mi restos antaŭ vi, eĉ se vi mem volus forpeli min.

M: Bone. Se unu fojon vi venis, (Frapas) ne nur 30 tagojn aŭ 50 tagojn, (Frapas) sed eĉ unu jaron, eĉ du jarojn (Frapas) mi restigos vin. (Frapas) Mi ne forpermesos vin, (Frapas) eĉ se vi petus forpermeson. (Igui surmetas la kufon) Igui, Igui, Igui! Strange! Li ĵus estis ĉi tie. Igui, Igui, Igui! (Iras al SYOOMEN kaj alfrontas al Igui, kiu montras sian nazon per maldekstra montro-fingro) Mirinda afero! Igui, Igui, Igui! Kien li foriris?!

I: Vere mirinde! Dank' al la kufo Sinjoro tute ne vidas min. Jen graco de Avalokiteŝvaro en Templo Kiyomizu, je kiu mi kredas. De nun mi vizitados al Kiyomizu en ĉiu monato.

と存(ぞん)ずれば、かやうの有難(ありがた)い事はござつてこそ。これからは月詣(つきぎ)でを致さうと存(ぞん)ずる。」

亭主(正面を向く)「居杭居杭居杭。はて合點の行かぬ事ぢや。どちへ参つた事ぢや知らぬ。いつ参つてもかやうの事はござらぬが、不思議な事でごさる。(揚げ幕(あげまく)に向かつて) やい〜居杭が見えぬ程に門を打て。人を一人も出すな。居杭居杭。」

算置(段(だん)熨斗目(のしめ)、長袴(かきも)、小刀(こがたな)。扇(あふぎ)。腰に算木(さんぎ)袋。懐中(ちゅうちゅう)に八卦(はつぱ))「占(せん)や算(さん)。占八卦。しかも上手。御判の占なひ。」

亭主「いやこれへ算置(さんぎ)が参る。尋ねて見ませう。なう〜なうそこな人。

算置「やあ〜。こちの事でごさるか。」

亭主「なか〜。その方は算置か。」

算置「なか〜。陰陽(おみょう)でごさる。」

亭主「ちと頼みたい事がある程に、かう通らしませ。」

算置「畏(かし)まつてござる。」

居杭「いや算置をお呼びやつたが、定めて某(それが)の事でござらう。何事を申すぞ。ちと承(うけたまわ)らう。」(脇(わき)柱の下に坐り、算置と亭主を見てゐる)

亭主「まづそれにゆるりとおりやれ。」

算置「心得てござる。(算置は目附(めつけ)柱の下に、亭主は真中(まなか)に坐(すわ)る)さてこれはこなたのお屋敷でござるか。」

亭主「なか〜。身共(みども)が屋敷でおりにやる。」

算置「まづかう見渡しまするに、お屋敷取りの様子御普請のお作意、どこからどこまでも御念が入りましてござる。中にもこれに立てました柱は、御子孫繁昌息災延命、五百八十年萬萬年と榮えさせらいで叶はぬお柱取りでござ

M: Igui, Igui, Igui! Strange! Kien li foriris?! Neniam estis tia afero. Mirinda okazaĵo! (de SITEBASIRA al AGEMAKU) Igui malaperis! Fermu la pordegon. Lasu neniun eliri! Igui, Igui!

Divenisto (kun sako de aŭgurbloketoj sur la kokso kaj sortosimboloj en la sino): Divenas la sorton. Diveno per aŭguroj. Trafa diveno, fama divenisto.

M: Jen venis divenisto. Mi konsultu lin. He ho, Sinjoro!

D: Ĉu vi vokis min, Sinjoro?

M: Jes, vin. Ĉu vi estas divenisto?

D: Jes, ja! Mi estas sortodivenisto.

M: Mi volas konsulti vin. Bonvolu enveni.

D: Jes, Sinjoro, laŭ via ordono.

I: Diveniston vokis Sinjoro! Eble li konsultos pri mi. Kion ili parolos? (sidiĝas ĉe WAKIBASIRA)

M: Bonvolu sidiĝi.

D: Dankon. (Sidiĝas M meze kaj D ĉe METUKEBASIRA) Ĉu vi estas la mastro de la domo?

M: Jes, la domo estas la mia.

D: Laŭ mia juĝo tre bona estas la aranĝo de la ĉambroj. La domo estas tre atenteme konstruita! Aparte bona estas la kolono, kiu certigas prosperon, sekuron kaj longan vivon de viaj praidoj ĝis post miloj kaj milionoj da jaroj.

る。」  
亭主「餘(よ)の者の賞むると違うて、  
そなた衆(しゅ)のそのやうに賞めてく  
れさしますれば、一入(ひと)大慶にお  
りやる。」

算置「私のかやうに申しては、毛頭相違  
はござりませぬ。さて御用と言つば、  
いかやうな事でござる。」

亭主「失(う)せ物でおりやるが、この  
屋敷を出離(では)れたか出離れぬか見  
ておくりやれ。」

算置「してそれは、いつの事でござる。」

亭主「今日唯今の事でおりやる。」

算置「今日唯今。」

亭主「なか〜。」

算置「今日は(こゝろ)何月幾日。最早  
(も)何の何刻(上演の月日と時刻【干  
支(と)】を言う)でもござりませう。」

亭主「その時分(じぶん)でおりやらう。」

算置(左手を出し親指で人さし指から数  
える)「きんなばんたんちやうけん。  
まづ手占がようござる。けんは見ると  
も現るるとも書いた文字でござるによ  
つて、この失(う)せ物は現れいで叶  
はぬ失せ物でござる。もしこれは生類  
(しやう)でばしござるか。」

亭主「まづそのやうな物でおりやる」

居杭(左の人差指で自分の鼻を指してう  
なづく)「疑ひも無い生類生類」

算置「いや〜。このお屋敷を出離れた  
失せ物ではござりませぬ。」

亭主「何ぢや、この屋敷の内を出離れた  
失せ物では無い。」

算置「なか〜。」

亭主「それならばきやつがはいり所をさ  
いておくりやれ。」

算置「み所(ところ)をな。」

M: Mi estas des pli ĝoja, ke ne  
ordinara homo, sed vi, divenisto,  
tiel laŭdas mian domon.

D: Certa estas mia diveno. Nu, pri  
kio, Sinjoro, vi konsultos min?

M: Pri io perdita. Volu diveni, ĉu ĝi  
ankoraŭ restas en la domo aŭ jam  
ekstere.

D: Kiam ĝi malaperis?

M: Hodiaŭ kaj ĵus.

D: Hodiaŭ kaj ĵus?

M: Jes, ja.

D: Hodiaŭ estas la < >a de < >. Jam  
estas la < >a posttagmeze, ĉu ne?

M: Devas esti ĉirkaŭ tiu horo.

D: Kin, Nan, Ban, Tan, Tyoo, Ken.  
(per la maldekstra dikfingro  
kalkulas ek de la maldekstra  
montrofingro) Ho, bona aŭguro  
laŭ manodivenado. `Ken' signifas  
`vidi' aŭ `aperi'. Tial vi certe  
retrovos la perditan. Ĝi estas  
vivaĵo, ĉu ne?

M: Io simila al vivaĵo.

Igui: Vivaĵo, sendube, vivaĵo!  
(Montras sian nazon per mal-  
dekstra montro-fingro kaj balancas  
la kapon)

D: Do, ĝi ne estas ekster la domo.

M: Ne ekster la domo?

D: Ne, certe ne!

M: Montru, do mi petas, kie ĝi estas.

D: Ĉu mi divenu la lokon?

M: Jes, mi petas!

D: Mi devos do uzi la aŭgur-

亭主「なか〜。」

算置「しからば一算置かずはなりますまい。」

亭主「それはともかくもでおりやる。」

算置(算木袋の紐(ひも)を解(と)きながら)「いや申し。私はいづ方へ参つても、算(さん)がよう合ふ〜とごぞつて、いづれも名をば仰(おほ)せられいで、ありやうが來た、ありやう〜とばかり仰(おほ)せられまする程に、こなたにも、向後(きやう)さやうに思召(おぼ)して下されませい。」

亭主「それは近頃(ちか)頼もしうおりやる。(算置は算木を取り出し投げる)これは珍しい算でおりやる。」

算置「奇特(きと)とお氣がつかせられた。これは天狗(てん)の投げ算と申して、他の家には無い算でござる。」

亭主「さう見えておりやる。」

算置「さらば算木を直ませう。」

亭主「ようおりやらう。」

算置「一得の水・二義の火・三生の木・四殺の金・五鬼の土・六害の水・七陽の火・八雑の木・九厄の金。體が一得の水遊魂に當つてござる。遊魂の二字は魂遊ぶと書いた文字でござるによつて、この失せ物はいかにも悠悠(ゆう)と悠に構へて居りまする。」

亭主「はてさてそれは憎い事でありやる。」

算置「いや〜。このお屋敷の事はさて置きまして、このお座敷の内を出離れた失せ物ではござりませぬ。」

亭主「やあ〜。この座敷の内を出離れた失せ物では無い。」

算置「なか〜。」

亭主「それならば何を隠さうぞ。生類と

bloketojn.

M: Ha, mi dankas.

D: (Mallaĉante la sakon) Ĉar mia diveno ĉiam trafas, oni nomas min ne per la vera nomo, sed alinome `Ĉiamtrafa'. Ankaŭ vi, Sinjoro, de nun volu nomi min `Ĉiamtrafa'.

M: Fidinda divenisto vi do estas. (Divenisto ĵetas la bloketojn) Ha, kuriozan metodon vi praktikas!

D: Admirinde vi tion rimarkis, Sinjoro! Jen estas ĵet-aŭguro de Tenguo, kiun praktikas neniu krom mia familio.

M: Certe ne.

D: Mi do ordigu la bloketojn.

M: Mi petas.

D: Unue: akvo por gajno, Due: fajro por justo, Trie: arbo por vivo. Kvare: metalo por morto, Kvine: tero por demono, Sese: akvo por damaĝo, Sepe: fajro por gajo, Oke: arbo por sufero, Naŭe: Metalo por plago. Jen akvo por gajno kuŝas ĉe Yuukon. Yuukon signifas `vagantan animon'. La perdita aĵo do estas tute libera kaj senĝena.

M: Ha, tio indignigas min!

D: Ĝi nun estas en la domo, kaj ankoraŭ en ĉi tiu ĉambro.

M: Ĉu vi diras, ke ĝi estas en ĉi tiu ĉambro?

D: Jes, en ĉi tiu ĉambro.

M: Mi diru, la vivaĵo estas homo!

D: Ĉu vere?



言つば人でおりやる。」  
算置「やあ〜。」  
亭主「人でおりやる。」  
算置「人ならばこのお座敷の内に居るが、見えぬと申すは合點(がんで)の行かぬ事でござる。」  
亭主「とてもの方に方角をさいておくりやれ。」  
算置「方角をな。」  
亭主「なか〜。」  
算置「方角・待ち人などと申して、算の上ではつつと祕事に致す事ではござれども、置きかかつた事でござるによつて、見て進(ん)じませう。」  
亭主「それは過分(かぶん)におりやる。」  
算置「すなはちこれにござる。水は方圓(ほうえん)の器物(きぶ)に隨(したが)ひ、人は善惡の友によると申して、これは朝夕あなたのお伽(とぎ)を致いて、參らいで叶はぬ失せ物でござるが、さやうでござるか。」  
亭主「まづそのやうなものでおりやる。」  
算置(卦(け)を見ながら)「大水出れば堤(つみ)の弱り。大風吹けば古家(ふるや)の祟(た)り。鼠(ねず)桁(けた)走れば猫きつと見たり〜。(正面上を見る。居杭も見る)そうじて逸物(いもう)の猫が鼠を見つめましては、動く事もなりませぬ。その如(ごと)く慮外(りょがい)ながらあなたを逸物の描(え)に譬(たと)へまして、かの失せ物を鼠に取りました時は、あなたのこれにござる中は、いづ方へ参りたうても、いかな動く事もなりませぬ。」  
亭主「それは氣味のよい事でおりやる。」  
算置「さて方角に取つて申さうならば、右下左上右下左上、左上とござる。左はひだり上はかみでござるによつて、あなたの左の上の方に居りまする。」

M: Jes, homo!

D: Strange, ke mi ne vidas la homon, kiu estas en la ĉambro.

M: Nu, divenu la direkton.

D: Direkton?

M: Jes, mi petas.

D: Kvankam direktodivenado kaj hom-serĉado estas esotera sekreto de miaj prapatroj, mi praktiku tion por findiveni la aferon.

M: Mi dankas elkore.

D: Mi nun komencu. Akvo prenas la formon laŭ la ujo, Homo agas laŭ la amiko. Tiu homo ĉiam vizitadas vin, kiel nepre necesa kunparolanto, ĉu ne?

M: Eble vi pravas.

D: (Rigardante la aŭguron de blokoj) Inundo rompas digon, vento detruas domaĉon kaj kato okulboras muson. Se kapabla kato okulboras muson, ĝi jam ne povas movi sin. Pensu, ke vi estas tiu kapabla kato, kvankam estas ne dece, kaj ke la perdita estas tiu muso. Dum vi estas ĉi tie, tiu homo ne povas movi sin.

M: Taŭga puno por li!

D: Mi diru la direkton: dekstre-sube, maldekstre-supre, dekstre-sube, maldekstre-supre... Mi divenis maldekstre-supre. Li do estas maldekstre-supre de vi.

M: Sed, vidu, neniuj estas tie.

亭主「これお見やれ。何も居(お)らぬぞや。」

算置「尤(もつ)も見ましたところは何も居らぬやうにはござれども、かやうの事には寸善尺魔神隠しなどと申す事がござる程に、ちと捜(さ)いてごらうじられませい。」

亭主「捜いてな。」

算置「なか〜。」

亭主「心得ておりやる。やつとな。」(両手でさぐる。居杭は後へまわり、立つて橋掛りへ行く)

算置「何と居りませぬか。」

亭主「いや〜。何も居らぬ。」

居杭「さても〜上手かな。ちとゐ所を變へて見ませう。」(抜き足差し足で舞臺へ出て、算置と亭主の間に入る)

算置「はてさて不思議な事ござる。それならば今度は拂ひ算ぢやまで。」

亭主「それはともかくもでおりやる」

算置「一上や二上がだけの水を見て、三上の木を拂ふなり。(算木を取つて脇へのける)四殺みつ五鬼の土をばそのままに、六害の水を拂ふなり。(取つてのける)七四殺八灘七つになる時は、九厄の金を拂ふなりけり。(取つてのける)ははあ。居らぬこそ道理なれ。早(は)ゐ所を變へましてござる。」

亭主「はてさてそれは憎い事でおりやる。」

算置「この失せ物は兌上斷(たいじやうだん)より震下連へ參らいで叶はぬ失せ物でござれども、ここに金剋木と剋致いた事がござつて、それへは參らいで離中斷へ參つてござる。尤(もつ)も離は南の卦ではござれども、文字の心を私の氣轉(きん)で申さうならば、離ははなる中はなかでござるによつて、最前(さいぜん)のところを立ち離れて、

D: Nek mi vidas ion ajn. Sed ni ne kredu la okulojn: nepre esploru!

M: Mi esploru?

D: Jes, nepre!

M: Konsentite! He ho! (esploras per ambaŭ manoj dum Igui iras tra malantaŭ Mastro al Ponto)

D: Ĉu vi ne trovis ion?

M: Ne, nenion.

I: Kia trafa divenisto! Nu, mi ŝanĝu la lokon. (Ŝteliras al inter M k D)

D: Kia stranga afero! Nun mi provu formetan metodon.

M: Provu kion ajn!

D: Lasu la unuan kaj la duan akvon kaj formetu la trian arbon. (Formetas la blokon al sia flanko) Lasu la kvaran morton, kvinan teron kaj formetu la sesan akvon de damaĝo. Lasu la sepan morton, okan suferon kaj formetu la naŭan metalon por plago. Jen, li nun ne troviĝas tie. Li jam ŝanĝis sian lokon.

M: Ve, kiel ruza li estas!

D: La perdita certe iros de *TAIZYOODAN* al *SINKAREN*. Metallo tamen superas Arbon. Li tial haltas ĉe *RI-TYUU-DAN*. Kvankam “RI” ordinare signifas “sude”, mi nun prenu “RI” “foriri” kaj “TYUU” kiel “inter”. Li do jam foriris de la loko kaj nun venis inter vin kaj min. (Surprizite Igui faletas malantaŭen sur la manojn)

今度はこなたと私との中へ参つて居りまする。」(居杭は兩手を後へつく)

亭主「これお見やれ。この餘席(よせ)も無いところに何と居らるるものでおりやるぞ。」

算置「居らぬやうにはござれども、かやうの事には争はれぬ不思議がござり、その上(うへ)最前は高聲に申したによつて、きやつがかどつて退(の)いたものでござらう。今度はこなたと私と密(ひそ)かにだまいて捜(たづ)ませう。」

亭主「だまいてな」

算置「なか〜」

亭主「心得ておりやる。」

算置「ぬからせらるるな。」

亭主「心得た。」

二人「やつとな。」(二人とも兩手で探す。

居杭はそつと橋掛りへ行く)

居杭「さても〜よう合はする事かな。いや致しやうがござる。」(舞臺へ出、算木を取り、八卦(はつ)を引き散らし、一の松へ行く)

算置「何と居りまするか。」

亭主「いや〜何も居らぬ。」

居杭「これではいかな上手でも合はする事はなりますまい。」

算置「ここ許(もと)などはちと暖かなやうにござる。」

亭主「暖かなやうにはあれども何も居らぬ。」

算置「はて居る筈でござるが。」

亭主「わごりよは上手さうにおしやれども、一圓(いっぺん)算が合はぬぞや。」

算置「私の算(さん)の合はぬ事はござらぬが、今日のやうにちろり〜と致(いた)いて、算の置きにくい事はござらぬ。これはいかな事。算の合はぬこそ道理なれ。この如くに八卦(はつ)を取り散らし殊(こと)にこれは算木が足り

M: Vi vidu! Kiel li povus esti en tia malgranda spaco.

D: Kvankam neniuj ŝajnas ekzisti, ni ne diskutu pri mistero. Ni, krome, parolis tro laŭte; eble li rimarkis kaj foriris. Nun ni ataku kaŝe kaj surprize

M: Surprize?

D: Jes, ja!

M: Konsentite.

D: Estu preta!

M: Konsentite.

Ambaŭ: He, ho! (Traserĉas per ambaŭ manoj. Iguj foriras al PONTO)

I: Ĉiam trafe li divenas mian lokon. Jes, mi havas bonan ideon. (Iguj iras al scenejo, prenas bloketojn kaj forbalaas la sorto-simbolojn.)

D: Ĉu vi trovis lin?

M: Ne, neniun.

I: Jam ne plu trafos la diveno, kiel ajn sperta estas la divenisto.

D: Iom varme ĉi tie.

M: Jes, varmete. Sed, troviĝas neniuj.

D: Li devus esti ĉi tie.

M: Kvankam vi nomas vin “Ĉiam-trafa”, tute ne trafas via diveno.

D: Ĉiam trafas mia diveno. Neniuj tamen ŝanceliĝas la aŭguroj kiel hodiaŭ kaj mi malfacile divenas. Ha, kio okazis? Mi komprenis, kial ne trafis la divenoj! Ĉar oni forbalais la simbolojn... Mankas ja bloketoj. Redonu ilin al mi.

M: Por kio mi prenis viajn bloketojn!

ませぬ。こちへ返して下されい。」  
亭主「某(それ)の算木を取つて何にするものでおりやる。(居杭は舞臺へ出、亭主の左耳へ算木を一本挟(は)む。亭主は耳の算木を取り不思議さうに見て、算置の方へ投げやる)これも要(い)る物ならば取つて置かしませ。」  
算置「それごらうじられい。こなたにはこれを澤山(たくさん)な物のやうに思召(おぼ)しませうが、一本足(た)らいでも算が合ふ物ではござらぬ。(居杭は算置(おき)の右耳へ算木を一本挟む)これは不思議な事ぢや。」  
亭主「はてさて合點の行かぬ行かぬ事ぢや。(居杭は亭主の頭の上から、算木を一本落す)それ〜取つて置かしませ。」  
算置「それ見させられい。(居杭は算置の頭の上から、算木を一本落す。續いて兩人の向うへ残らず投げ出す)これは不思議な事でござる。」  
居杭(橋掛りの一の松へ行く)「さても〜面白い事かな。ちと喧嘩(けん)をさせませう。」  
算置「こなたには算の御用ではござらいで、お小姓衆(こしよ)かなどに仰(おほ)せつけられて、私を黜(な)らせらると見えた。」  
亭主「わごりよは算の合はぬのみならず、いろ〜な事をおしやる。早う仕舞(しま)うて歸らしませ。」  
算置「歸らいで何とするものでござる。」(算木を袋へ入れて仕舞ふ。居杭は舞臺へ出て、扇(あふ)で亭主の肩を打つ)  
亭主「あ痛(いた)〜。やい算置。なぜに科(か)も無い者を打擲(ちやう)するぞ。」  
算置「何ぢや打擲。」  
亭主「いかにも」

(Igui eniras la scenejon, metas unu bloketon ĉe la orelo de Mastro, kiu prenas ĝin mire kaj ĵetas ĝin al Divenisto) Vi mem zorgu pri tio, se necese.

D: Jen vi vidas! Kvankam ŝajnus, ke multas la bloketoj, ne trafas la diveno, kiam mankas eĉ unu. (Igui metas unu bloketon ĉe la dekstra orelo de Divenisto) Ha, strange!

M: Jes, stranga afero! (Igui faligas unu sur la kapon de Mastro) Jen, vi prenu ĝin.

D: Jen vi vidas! (Igui faligas unu sur la kapon de Divenisto. Poste forĵetas ĉiujn bloketojn) Kia stranga afero!

I: (sur PONTO ĉe la unua pino) Kia amuzo! Nu, estu kverelo inter ili.

D: Vi ne volas divenon, mi vidas, vi nur ludmokas min kun helpo de iu servisto.

M: Vi ne sukcesis diveni kaj nun kalumnias min. Prenu la bloketojn kaj tuj foriru!

D: Kial mi ne foriru! (Metas la aŭgurbloketojn en la sakon. Igui eniras la scenejon, per ventumilo batas Mastron sur la ŝultro)

M: Aj, dolore! Hej, divenisto, kial vi batis min senkulpan!?

D: Kio? Mi batis?

M: Jes, vi batis min.

D: Mi estis ĉi tie kaj enmetis la bloketojn. Kiel mi povus bati vin!

算置「某は算木を仕舞うて居つて、それへ手もやりは致さぬ。」

亭主「手もやらぬと。そちより外(ほか)に誰があるものぢや」(居杭は算置の肩を打つ)

算置「あ痛〜。なう申し。なぜに科も無い者を打擲召さるる。」

亭主「打擲。」

算置「なか〜。」

亭主「某は、それへ手もやりは致さぬ。」

算置「手もやらぬと。こなたより外に誰があるものでござる」(居杭は亭主の鼻と耳を持ち向うへ投げ倒す)

亭主「あ痛〜。やい算置。なぜに某(それ)をいろ〜に𦏧(な)る。」

算置「何ぢや𦏧る。」

亭主「なか〜。」

算置「某は、それへ手もやりは致さぬ。」

亭主「手もやらぬと。そちより外に誰があるものぢや。」(居杭は算置を投げる)

算置「あ痛〜。なう申し。なぜに某をいろ〜に𦏧らせらるる。」

亭主「某は、それへ手もやりは致さぬ。」

算置「手もやらぬと。こなたより外に誰があるものでござる。」

(居杭は兩人の膝(ひざ)を扇で二度叩き、橋掛りへ行く)

亭主「あ痛〜。」

算置「あ痛〜。」

亭主「この上は堪忍がならぬ、弓矢八幡逃(に)す事では無いぞ。」(と右の肩を脱(ぬ)ぎ、刀(かた)に手をかける)

算置「某も負(ま)くる事では無いぞ。」(同じく刀に手をかける)

二人「いや〜。」(互に左手で相

M: Vi estis tie? Kiu batus min, se ne vi! (Igui batas Diveniston sur la ŝultro)

D: Aj, dolore! Aj, dolore! Mi demandas, Sinjoro, kial vi batis min senkulpan!?

M: Kio? Mi batis?

D: Jes, vi batis min.

M: Mi estis ĉi tie. Kiel mi povus bati vin!

D: Vi estis tie? Kiu batus min, se ne vi! (Igui kaptas Mastron je la nazo kaj orelo kaj faligas lin)

M: Aj, dolore! Hej, divenisto, kial vi faligis min!?

D: Kio? Mi faligis?

M: Jes, vi faligis min.

D: Mi estis ĉi tie. Kiel mi povus faligi vin!

M: Vi estis tie? Kiu faligus min, se ne vi! (Igui forĵetas Diveniston)

D: Aj, dolore! Aj, dolore! Mi demandas, Sinjoro, kial vi ĵetis min!?

M: Mi estis ĉi tie. Kiel mi povus ĵeti vin!

D: Vi estis tie? Kiu ĵetus min, se ne vi! (Igui po dufoje batas la femurojn de ambaŭ kaj iras al PONTO)

M: Aj, dolore! Aj, dolore!

D: Aj, dolore! Aj, dolore!

M: Mi jam ne indulgos vin. Vi ne foriros sen puno! (Nudigas la dekstran ŝultron kaj kaptas tenilon de glavo)

D: Vi ne venkos min! (Faras same)

Ambaŭ: Hej, hej, hej! (Per maldekstra mano kaptas la bruston kaj puŝiĝas reciproke sin)

I: Amuze! Kiel amuze! Per ili mi ludu

手の胸をつかみ、刀に手をかけ押し合ふ)

居杭「さても〜面白い事かな。まだいろ〜に𦵏つて遊ぼう。これはいかな事、本(ほん)の喧嘩になつたさうな。(兩人の組み合つてゐるのに手をかけ、頭巾(ずんき)を取る)申し〜居杭はこれに居ります。〜。」

算置「これは何でござる。」

亭主「尋ぬる居杭は、これでおりやる。」

二人「やいあの横着者。」

居杭「眞平許(まっぴん)いて下(くだ)されい。」

二人「某どもをたらいた。どちへ逃ぐる。人は無いか。捕へてくれい。やるまいぞ〜。」

(終わり)

※天狗：昔話の翼のある半神。

plu... Ho, ve, okazas vera batalo!  
(Igui ŝoviĝas inter la batalantojn kaj formetas la kufon) Hej, Sinjoro, Igui estas ĉi tie. Igui estas ĉi tie.

D: Kiu li estas?

M: Jen Igui, la perdita!

(Igui forkuras tra PONTO)

Ambaŭ: Kia kanajlo vi estas!

I: Pardonon, mi petas.

Ambaŭ: Vi ja trompis nin. Ĉiuj venu kapti lin. Ni ne pardonos vin! (Ili Postkuras Igui)

(fino)

※ Tenguo: Flugil-hava duondio.

## しびり

狂言記 外五十番 卷二の四  
登場人物：主、太郎冠者

主「辺(あ)りの者。(類型的な「主」  
(しゅ)の名乗(な)り『これはこの邊  
(あ)りの者でござる。』を略記したも  
のか。)冠者(くわ)あるか。」

冠者(狂言袴(かみ)と扇子(せん)を持つ)  
「お前(ま)にみまする。」

主「やがて客がある、淀鯉(よどい)を買い  
に行け。」

冠者「畏(かしこ)た。」

主「早う戻れ。」

冠者「心得ました…夜も暁(あけ)も、鯉  
を買いに参れ〜とおしやるは定  
(じや)の事。たゞ作り病(やま)をして  
参るまい。あ痛(いた)〜〜〜。(ひ  
ぎを抱えてうずくまる)

主「冠者は何とした。」

冠者「親の譲りをかれまらしたしびりが  
起こつて。あゝ痛や〜、悲しや〜。」

主「何としびりがきれたと言ふか。」

冠者「親の時より、よそへ行(ゆ)きと  
もないと思へばそのまゝ起こると言は  
れましたが、にはかにしびりがきれて  
御ざる。」

主「よく休め。」

冠者「畏(かしこ)た。」

主「思ひ付けた、それがしの仕(つか)り  
やうがある。(向きを変えて)何と、『伯  
父御(おぢ)様より俄(にわか)なれども振  
舞(まわ)に参れ。則(すなは)ち、冠者をも

## Podagro

el “Kyoogenki GaiGozyuuban” vol. 2.4  
tradukis SIMATANI Takesi 1998

Mastro: (Kun longa *KAMISIMO*,  
mallonga glavo kaj faldita  
ventumilo) Mi estas loĝanto en  
ĉi tiu loko. Nun mi ion ordonos  
al la servisto. Mi voku: Kie estas  
*Tarookazy*?

Tarookazy: (Kun *KYOOGEN*-stila  
*KAMISIMO* kaj faldita ventumilo) ♪  
Jen, antaŭ vi!

M: Mi havos gaston. Do vi,  
Tarookaza, iru kaj aĉetu karpon de  
Yodo.

T: Laŭ via ordono, Sinjoro!

M: Baldaŭ revenu kun bongusta  
karpo.

T: Jes, Sinjoro, mi rapidos! (Al si) Jen  
nokte, jen matene li ordonas aĉeti  
karpon. Mi ruzos kaj ne iros aĉeti.  
(Sidiĝas kun la genuo en la sino) Aj,  
dolore! Aj, dolore!

M: Kio okazis al vi, *Tarookazy*?

T: De la patro mi heredis podagron,  
Sinjoro. Aj, dolore! Aj, dolore!

M: Ĉu podagro atakas vin?

T: Patro diris, ke podagro atakas min  
ĉiam, kiam mi ne volas iri ien. Li  
pravas: nun min atakas podagro.

M: Do, *Tarookazy*, vi devas bone  
ripozi.

T: Laŭ via ordono, Sinjoro!

M: (Al si) Mi havas bonan ideon! Mi  
trompos lin. (Al *ZIUTAIZA*) Do, Onklo  
sendis vin por inviti min al festeno,  
ĉu ne? Ĉu ankaŭ *Tarookazy*?

呼ぶ』と言ふて使(つか)が来た。『おれは参らふず、冠者はなるまい』と言ふて返事せい。」

冠者「なふ旦那様。」

主「何ぞ用か。」

冠者「申(まう)伯父御様へ御振舞(ふるま)に御出(おい)ならば、某(それがし)も召し連れられてください。」

主「しびりがきれたらば、なるまいぞ。」

冠者「ことはりを申(まう)て聞かしますれば、つみ直(な)ります。」

主「さらば直してみよ。」

冠者「畏(かしこ)た。いかにしびりよく聞(き)。旦那様のお供して伯父御(おぢ)様へ参れば、なる程(ほど)結構な御振舞(ふるま)をくださる。よい酒もたくさんに飲む。此(こゝ)たびの事じや、直(な)れ。ほい。」

主「返事は誰がしたぞ。」

冠者「しびりで御ざらふ。」

主「奇特(きど)な事の。しびりは直るか。」

冠者「すきとよふなりまらした。」

主「名誉なしびりじや。よくば、おつつけ行(ゆこ)。立て。」

冠者「手を引き立ててください。」

主「さあさあ、立つてみよ。」

冠者「立ちましたが、よふ御ざる。」

主「しびりの気(け)はないか。」

冠者「お振舞(ふるま)のお供しては、五里でも三里でもしびりが起こる事では御ざない。」

主「さやうならば、言ひ付けてをいた肴

Ve, kompatinde! Li nun havas podagron! Diru al Onklo, ke mi mem iros, sed *Tarookazy*a ne povos iri...

T: Sinjoro, mi petas! Mi petas, Sinjoro!

M: Kio okazis, *Tarookazy*a?

T: Kiam vi, Sinjoro, vizitos vian estimatan onklon, mi volus akompani vin.

M: Kun podagro vi ne povos iri.

T: Mi persvados ĝin. Tuj mi resaniĝos.

M: Ĉu vi povas paroli kun malsano? Do, persvadu la podagron.

T: Laŭ via ordono, Sinjoro! (Al la genuo) Atentu vi, podagro: Akompane al Sinjoro mi devas iri al festeno de la estimata onklo. Tie estos multe da bongustaĵo kaj bona sakeo. Do, vi foriru portempe... Konsentite!

M: Kiu respondis?

T: La podagro respondis, Sinjoro.

M: Ĝentila malsano! Ĉu ĝi jam foriris?

T: Jes, nun mi estas tute sana.

M: Stranga malsano! Do, ni rapidu. Ekstaru tuj!

T: Bonvolu teni min, Sinjoro, je la mano.

M: (Tenas lin je la mano) Do, ekstaru.

T: Jen mi staras. Tute sana nun mi estas.

M: La podagro baldaŭ revenos, ĉu ne?

T: Tute ne, Sinjoro! Ĝi jam ne povos reveni, kiel longe mi iros kun vi por festeno.

M: Do, tuj iru kaj aĉetu fiŝojn por la



(さか)を買(か)ふて来い。」

冠者「それではまた、はやしびりが起こります。あ痛(いた)〜。」

主「憎いやつの。しされ。」

冠者「かしこまつた。」

(終わり)

《この作品は初心者、特に子供が太郎冠者を演じることが多い。》

gasto.



T: Nun la podagro revenis. Aj, dolore!

M: Kia kanajlo vi estas!

T: Pardonon mi petas!

(fino)

《Ofte novico, precipe infano ludas Tarookazya.》



## 抜殻 (ぬけがら)

狂言記 卷一の四

登場人物：殿(と)、太郎冠者(かじゃ)

殿「罷出(まいり)たるは御存(ごんぞ)じの者、太郎官者(くわ)有(あ)るか。」

冠者「御前(おま)に。」

殿「念なふ早かつた、なんぢ呼び出(いだ)すは別儀(べぎ)でない、かの様(さま)へ参りて、『此中(このち)は、お人でも進(しん)ぜぬが、何事(なに)も御ざらぬか、冠者を見廻(みま)に進ずる』と申(まう)て、急(いそ)で行(い)て来(こ)い。

冠者「畏(かしこ)て御ざる。」

殿「急げ。」

冠者「はあ」

冠者「さても、頼(たの)みだる人は、いつもかの様(さま)へ行折(ゆり)は酒をくれらるゝが、今日(けふ)は何と致してやら忘れられて御ざる、ま一度戻つて給(たま)るやうに致そ、申(まう)殿様、御ざりまするか。」

殿「何(なに)として戻つた。」

冠者「その事で御ざりまする久しうて人を進ぜらるゝほどに御状(ごじょう)をつかわされたら、よう御ざりませう。」

殿「いや、状まではいらぬ、急いで行(い)て来い。」

冠者「畏(かしこ)て御ざる、これはさて、何としてもくれられぬ、いや思ひ付けた事が御ざる、申(まう)殿様。」

殿「何として戻つた。」

冠者「その御事(ごこと)で御ざりまする『殿様は何事もないか』などと、問わしやる時には何と申(まう)ませうぞ。」

殿「はてさて、いらざる念をつかひおる事かな、はあ、思ひ付(し)て御ざる、いつもきやつに酒をくれますが、今

## Ŝelo

el “Kyoogenki” vol. 1.4

tradukis SIMATANI Takesi 1998

Mastro: (Kun longa *KAMISIMO*, mallonga glavo kaj faldita ventumilo) Mi estas fame konata sinjoro. Nun mi ion ordonos al la servisto. Mi voku: Kie estas *Tarookazy*?

Tarookazy: (Kun *KYOOGEN*-stila *KAMISIMO* kaj faldita ventumilo) ♪ Jen, antaŭ vi!

Mi estas malfeliĉa kuracisto en Kioto. En la metropolo troviĝas multe da eminentaj kuracistoj. Ĉar tie malbona kuracisto ne prosperas, mi iru al la Oriento por trovi klientojn.(K marŝas) Nun mi iru haste. Ho, ve, kiel malfeliĉe mi foriris de Kioto delonge konata kaj iros al Oriento tute fremda! Mi tamen iel trovu mian feliĉon kaj reiru al Kioto! ...Ha, mi jam troviĝas en granda herbejo. Ĉi tie certe estas *Musasino* tre fama. Kiel vaste ĉi tie estas! Ho, ve! Abrupte malheliĝis, kvankam ĝis nun serenis. Baldaŭ pluvegos! En la herbejo estas neniam rifuĝejo. ⚡ Ho, terure, tondras ie fore! ⚡ Jam ekpluvis forte! Tondras multe! ⚡ Povas esti, ke fulmo batos min! Terure, terure, terure!

Tondro: (En tamburado) Fulmo! Tondro! Fulmo! Frapo! ...Ho, ve! Mi falis de la nuboj! Tre forte mi batis la kokson. Aj, dolore! Aj, dolore! Ho,(li trovis la kuraciston) kiu vi estas?

医者「私(わたし)は医者でござりますが、東(あづ)の方(かた)へ下ります所に、夕立にあひました。」

雷「何じや、医者じや。それは幸(さいひ)のことじや。身どもも不慮に爰(こゝ)へ落ちた。したゝか腰を打った。療治(りょうぢ)をしてくれ。」

医者「私(わたし)も人間の療治は形(かた)のごとく致しましたが、雷殿の療治は、終(つひ)に致しませぬ。ご許されませ。」

雷「いや〜、人間の療治の、雷の療治といふて、別(べつ)に違ひは有(あ)りまい、療治せい。」

医者「どうぞござつても御許されませ。」

雷「をのれは憎いやつの。療治せぬにをいては、たつた一つかみにつかみ殺してやらふぞ。」

医者「あゝ悲しや、まつびら御許されませ。成程(なるほど)療治致しませふ。先(まづ)脈をうかゞひませふ。」

雷「いかにも見てくれ。」

医者「さらば脈をとりませふ。」

雷「やい〜、是(これ)は変つた脈じやなあ。」

医者「其(その)義でござる、人間の脈は手にござる、雷殿の脈は頭脈(づかみ)と申(まを)して、頭(づ)でとります。」

雷「それ〜、夫程(それほど)知つてゐて知らぬと言ふ、何と有(あ)りぞ。」

医者「されば脈が殊外(ことほか)高ぶりますが、こなたには御持病が有(あ)り見へました。」

雷「やあ、そちは大きな上手じや。成程(なるほど)、をれは持病が有(あ)り。持病は何であらふと思ふ。」

医者「されば、御持病は中気が有(あ)り見へました。」

雷「扱(さ)も上手じや、中風(ちゆうふう)が

Kuracisto: Mi estas kuracisto. La pluvo trafis min en vojaĝo al la Oriento.

Tondro: Ĉu vi estas kuracisto? Tre bone! Pro akcidento mi falis ĉi tien kaj forte batis la kokson. Volu kuraci min!

Kuracisto: Multe da homoj mi kuracis, sed Tondron mi neniam kuracis. Pardonu, ke mi ne povas servi al vi.

Tondro: Ne, ne estas diferenco inter homo kaj Tondro en kuracado! Nepre kuracu min!

Kuracisto: Bonvolu rezigni pri tio.

Tondro: Kiel abomene! Se vi ne volas kuraci min, mi mortigos vin per unu premo.

Kuracisto: Ho, ve, terure! Vian indulgon mi petas! Mi kuracos vin. Unue mi esploros vian pulsadon.

Tondro: Bone, esploru min.

Kuracisto: Nun mi palpos.

Tondro: He, kial vi palpas tiel?

Kuracisto: Mi klarigos: Homan pulson oni povas palpi sur pojno. Sed tiun de Tondro sur kapo.

Tondro: Ho, tiel bone vi scias, kvankam vi pledis pri nescio!

Kuracisto: Tro oftaj estas viaj pulsoj. Certe vi havas malsanon, ĉu ne?

Tondro: Eminentia kuracisto vi estas! Mi ja havas malsanon. Kio laŭ via penso estas mia malsano?

Kuracisto: Mi suspektas, ke vi suferas paralizon.

Tondro: Kiel eminenta vi estas! Mi suferas paralizon. Volu kuraci kaj

有(あ)。何と中風も治(な)り、又したゝか腰を打ったも療治をして治してくれまいか。」

医者「されば中気は宿でござらば薬を調合致しませふずれ共(ども)、途中のことでござる、何共なりますまい。腰の痛みには針を持合(もちあ)しました。針を致しませふ。」

雷「其(その)針といふは痛い物ではないか。」

医者「いや〜、痛ふはござらぬ、人間さへ立てます。」

雷「それなら立(た)ててくれ。」

医者「畏(かしこ)でござる、横にならせられ。此(この)ごとくに針を懐中してをります。どこもとがよふござらふ、こゝは何とござる。」

雷「成程(なるほど)そこがよい気味(き)じや。」

医者「それなら爰(こゝ)に一本立てまふ、はつし。」

雷「あ痛(いた)い〜。」

医者「はつし〜。」

雷「あ痛〜、やれ〜、痛ひは〜、早ふ抜いてくれ〜。」

医者「是(これ)は雷殿共(ども)覚へませぬ。人間さへ立てます。経絡(けいらく)が違ひます、何と身をもだへなさるゝぞ。」

雷「いや〜、堪忍(にん)ならぬ、早(はや)ふ抜いてくれ〜。」

医者「尤(もと)もでござる、抜きまずぞ、こらへさせられ。さあ、抜きました。何とござる。」

雷「はあ、扱(さ)も〜、痛い物じや。去(さ)ながら今の針で痛みがよほど治つた。去ながら、まだどこやら痛みの残つた所が有(あ)て気味が悪ひ。」

医者「それなら、も一本立てたら痛みも中風も、すきと治しまして、根を切て

paralizon, kaj kokson batitan.

Kuracisto: Hejme mi povus doni al vi kuracilon kontraŭ paralizo. Sed en vojaĝo mankas kuracilo. Ĉar mi havas kun mi pinglon, mi aplikos akupunkturon kontraŭ doloro de via kokso.

Tondro: Akupunkturo dolorigas, ĉu ne?

Kuracisto: Tute ne, ne dolorige! Eĉ homo toleras ĝin.

Tondro: Mi do petas.

Kuracisto: Laŭ via ordono! Bonvolu kuŝiĝi, mi petas. Jen estas la pinglo por akupunkturo. Kien mi piku al vi? Ĉi tie, ĉu bone?

Tondro: Certe mi sentas tie agrable.

Kuracisto: Mi do piku ĉi tien, jen!

Tondro: Aj, dolore!

Kuracisto: Jen, jen!

Tondro: Aj, dolore! Ho, ve, kiel dolore! Jam forigu, mi petas!

Kuracisto: Kial krias Tondro?! Eĉ homo eltenas ĝin. Ne moviĝu, aŭ la pinglo pikos eraran vojon.

Tondro: Ne, ne, mi ne eltenos! Forigu la pinglon plej frue!

Kuracisto: Mi komprenis. Nun mi forigos ĝin, eltenu! Jen mi forigis. Kiel vi sentas nun?

Tondro: Ho, kiel doloriga ĝi estis! Mia kokso nun tamen malpli doloras, kvankam ie ankoraŭ restas doloro malsana.

Kuracisto: Se mi pikos ankoraŭ unu fojon, la pinglo komplete kuracos vian kokson kaj paralizon.



進ませふ。」

雷「それなら、も一本立(た)ててくれい。

痛(いた)ふなひ様にしてくれい。」

医者「心得ました、こゝがよふござらふ、  
爰(こゝ)に立(た)ませふ、はつし。」

雷「あ痛〜、やれ〜、こらへら  
れぬぞ。早ふ抜いてくれ〜。」

医者「今少(すこ)でござる、待たせられ。  
抜きますぞ、きつとしてござれ。」

雷「いや〜、痛ふてどふもならぬ、早  
ふ抜け。」

医者「心得ました、抜きますぞ。さあ、  
抜きました、何とござる。」

雷「扱(さ)も〜、痛ひ物哉。はあ、  
今の針で痛みがすきとよいは。」

医者「さふでござらふ。それなら、ちと  
立(た)てみさせられ。」

雷「立てみよふ、手を取(と)てくれ。」

医者「心得ました、手を取て立たしませ  
ふ、何とござる。」

雷「立てみてもよい、嬉しうこそあれ。  
最早(もはや)身どもは天上するぞ。」

医者「是(これ)、申し〜。」

雷「何ごとじや。」

医者「只今療治を致した薬代(やぐい)を被  
下(くだ)れ。」

雷「いや、身どもはふと爰(こゝ)へ落ち  
たによつて、持合(もちあはせ)がない、  
よい便宜(べんぎん)にをこさふぞ。」

医者「いや〜、それがいつのことやら  
知れませぬ。此(こゝ)ごとくに私(わたし)  
の遠国(とんこく)へ廻りますも、薬代を  
取り、身を立てふためござる。どう  
でも只今取らねばなりませぬ。」

雷「それでも、ない物はぜひがない。や  
あ、よいことを思ひ出(いだ)した、物と  
せふぞ。」

医者「何とござる。」

Tondro: Do ankoraŭ unu pikon mi  
petas. Tio tamen estu nedoloriga.

Kuracisto: Mi faros tiel. Ĉi tie taŭgas.  
Mi pikos ĉi tien, jen!

Tondro: Aj, dolore! Ho, ve, mi ne  
eltenos! Jam forigu la pinglon!

Kuracisto: Atendu iom da tempo!  
Baldaŭ mi forigos ĝin. Volu elteni.

Tondro: Ne, ne, mi ne eltenos! Forigu  
la pinglon plej frue!

Kuracisto: Mi komprenis. Nun mi  
forigos ĝin! Jen mi forigis. Kiel vi  
sentas nun?

Tondro: Kiel doloriga ĝi estis! Ho, la  
doloro tute malaperis!

Kuracisto: Bone, bone! Nun ekstaru,  
mi petas.

Tondro: Mi ekstaros. Subtenu min.

Kuracisto: Bone, prenu mian manon.  
Kiel vi sentas?

Tondro: Mi staras sen doloro! Kiel  
feliĉe! Nun mi leviĝos al la Ĉielo!

Kuracisto: Atendu momenton!

Tondro: Kion vi volas?

Kuracisto: Honorarion por kuracado.

Tondro: Mi ne havas monon, ĉar mi  
falis ĉi tien tute ne atendite. Iam  
mi pagos, kiam mi havos okazon.

Kuracisto: Mi tute ne scias, kiam vi  
havos okazon! Por vivteni min per  
honorario, vi sciu, mi vojaĝas al  
malproksimaj kaj fermdaj landoj.  
Nepre nun mi devas ricevi mian  
honorarion!

Tondro: Nenio helpas, ĉar mi ne  
havas. Ho, mi havas bonan ideon!  
Ĉu vi konsentas?

Kuracisto: Kion vi proponas?

Tondro: En la plej frua venonta pluvo

雷「今度夕立のする時に、そちが所へ落ちて、其(その)時薬代をやらふぞ。」

医者「なふ〜、をとましや〜、聞(き)もいやでござる。いやでもおふでも、今取らねばなりませんぞ。」

雷「それは医者殿、聞分(きわけ)がない。持合(もあ)がなければ、こゝに近付(ちか)きといふてはなし、借(か)つてやらふ様もない。何とそれならば、身どもに薬代の替りに、何ぞ似合(に)ふた望(のぞ)みはないか。」

医者「されば何でござらふぞ。や、思ひ付けた。此(この)ごとく田舎遠国(とんぐ)を廻りますれば、今年(ことし)は水損(すい)んがいた、干損(ひん)んがいたのと申(ま)して、薬代くれませぬ程(ほど)に、今から干損も水損もいかぬ様に、して被下(くだ)され。」

雷「それは何よりやすいことじや。身どもがまゝじや。水損干損(すいひん)のいかぬやうにして、世の中のよい様にしてやらふぞ。」

医者「それはかたじけなふござる。」

雷「其上(その)そちを、天薬(てん)の頭(か)に祝(い)ふてやらふぞ。」

医者「いよ〜かたじけなふござる。」

雷「それなら此(この)様子を謡(うた)に謡(うた)ふて天上(てん)せふ程(ほど)に、なんぢも謡へ。」

医者「心得ました。」

雷「(謡、太鼓打上)へ降(ふ)ては照(て)しつ〜一千年(いつせんねん)が其(その)間(ま)水損干損(すいひん)まじき御身(ごみ)は薬師(やくし)の化現(けげん)かや中風(ちゆうふう)を直(な)す薬師(やくし)をば典薬頭(てんやくかみ)と言ひ捨てて又鳴神(なるかみ)は上りけり〜」

mi falos al vi kaj pagos!

Kuracisto: Ho, ve, terure! Mi ne povas akcepti vian proponon! Nepre nun mi devas ricevi mian honorarion!

Tondro: Kuracisto, ne racia vi estas! Mi ne havas monon, nek konaton ĉi tie, kiu pruntedonos al mi. Ĉu vi tamen havas ian deziron por vi, kiun mi povos plenumi.

Kuracisto: Ĉu deziro por plenumi? Ha, mi havas deziron! Mi vajaĝas tra la provincoj malproksimaj. Oni ne donas al mi honorarion, kiam ili suferas de inundo aŭ sekeco. De nun por ĉiam ni ne havu sekecon nek inundon.

Tondro: Tio estas facila kaj laŭ mia plaĉo! Mi zorgos, ke vi havu nek inundon nek sekecon kaj la mondo estu prospera!

Kuracisto: Elkore mi dankas vin!

Tondro: Krom tio mi faros vin la ĉefmedicinisto!

Kuracisto: Multe mi dankas vin!

Tondro: Nun mi kantos pri tio kaj leviĝos al la Ĉielo. Ankaŭ vi kantu!

Kuracisto: Mi kantos!

Tondro kaj Kuracisto: (En tamburado)

♪ Por mil jaroj de nun estu  
En sereno kaj en pluvo  
Nek sekeco, nek inundo!  
Ĉar vi Bhajŝajaguruo  
Savis min de paralizo,  
Estu ĉefmedicinisto!  
Tondro nun al Paradizo!

Tondro: Fulmo! Tondro! Fulmo!

雷「ひつかり 〰 〰」  
医者「くはばら 〰 〰」

※ 医師：角(す) 頭巾(ずき)、編綴(へんづつ)、  
狂言袴、針、槌。

※ 雷：赤頭(あかがしら)、武悪面、厚板(袖  
無し法被)袴、脚半、羯鼓、撥。

※ 黄蘗：きはだ。ミカン科の落葉高木。  
樹皮は健胃剤・火傷の治療薬・黄色染  
料。

※ 典薬の頭(かみ)：宮中の医療・医薬等  
担当の典薬寮の長官。

※ り：二の字点, ゆすり点。

Kuracisto: Terure! Terure! Terure!  
(Ambaŭ eliras el la scenejo)

※ kostumo de Kuracisto:  
rektangula kufo, kies supron  
oni falde pendigas malantaŭen;  
kuracista haoro; hakamo kun  
desegnaĵoj; pinglo kaj martelo por  
akupunkturo.

※ kostumo de Tondro: longa ruĝa  
peruko; masko de demono; dika  
hapiro sen maniko; hakamo;  
surobendoj; tamburo; frapiloj.

※ felodendrono: arbo el rutoj.  
La ŝelo estas stomakuracilo,  
flava tinkturo kaj efikas kontraŭ  
brulvundo.

※ Ĉefmedicinisto: Ĉefo de kortegaj  
kuracistoj.

※ ⚡: simbolo de fulmo.

## 鬘桶 (かずらおけ)

腰掛けにしたり、ふたを盃  
にしたり、様々に使います。

狂言「柿山伏」では柿の  
木にもなり、山伏は鬘桶の  
上に登る。



## Nigra tino el lianoj

Nigra tino estas foje seĝo, foje ĝia  
kovrilo estas pokalo. Oni utiligas ĝin  
diversmaniere. En “KAKIJAMABUŜI  
(Jamabuŝo sur persimon-arbo)” li  
grimpas sur tinon, kiel sur arbon.

## 蝸牛 (かぎゅう)

原典：山本東本 (大蔵流)  
シテ：山伏、アド：主、太郎冠者

山伏「へ三(み)つの峯入(みねい)り、駈出(かけ)なる、三つの峯入り、駈出なる、行者(ぎょう)ぞ尊(た)かりける(詞)これは出羽(で)の羽黒山(はぐろ)より出(い)でたる、駈出の山伏です。このたび大峯(おおね)・葛城(からぎ)を仕舞い、唯今本国へまかりくださる。まず、そろりそろりと参ろう。

(道行)いや、まことに、行は萬行ありとは申せども、とりわき山伏の行は、野に伏し、山に伏し、岩木を枕とし、難行苦行を致す。

(常座で)その奇特(きど)には、(上を見て)空飛ぶ鳥をも、目(ま)の前へ祈り落すが、(落ちる鳥を視線で追ってから胸を張る)山伏の行力(ぎょうりき)です。

これはいかなこと。けさ、宿を早々立ったれば、殊(と)の外(ほか)眠うなった。何と致そう…いや、これに大きな藪がある。まず、入ってみよう。(舞台中央後方)エイエイヤツナ。(狭い隙間を通る所作で中央へ)これは打ち開いた、大きな藪じゃ。どの辺(あたり)りがよかろうぞ。いや、ここもよかろう。さらば休もう。(地謡座の前で)エイエイヤツナ。(寝)くたびれた、くたびれた。」

主「(主と太郎冠者登場。太郎冠者は後ろに座る。主は常座で)これはこの辺(あたり)りに住居(すま)致す者で御座る。それがし、果報めでたい祖父(おお)を一人(いち)ん)持って御座るが、これへ蝸牛(かぎゅう)を進上(すす)いたせば、なおなお、御寿命(ごじゅめい)御長遠(ごちやう)など申すによって、太郎冠者を呼び出(だ)だし、蝸牛を取

## Heliko

el la libro de YAMAMOTO Azuma  
tradukis SIMATANI takesi 2006

Jamabuŝo:(ĉe ZYOOZA al dekstro) ♪  
Ankoraŭ novico, mi tamen, hardita en *Kumano*, estas asketo jam eminenta. (al publiko) Mi estas novica jamabuŝo el la monto *Haguro* en *Dewa*. Nun mi iras hejmen de la montoj *Oomine* kaj *Katuragi*. Mi iru senhaste.

(rondiras) Inter miloj da ekzercoj la plej severa estas tiu de jamabuŝo kun bivakoj en kampoj kaj montoj.

(ĉe ZYOOZA)Antaŭ mia forto (vidas supren) falas birdo el aero. (okulsekvas falon; al la publiko) Jen estas la potenco de jamabuŝo!

Ho, ve! Tro frue en la mateno mi ekvojaĝis! Nun mi devas siesti... Ĉi tie estas granda veprejo. Mi eniru! (de meze malantaŭe) Nu, nu, hop! (kvazaŭ tra malvastejo iras al la mezo) Kiel vaste estas en la veprejo! Kie mi kuŝigu? Jen mi trovis bonan lokon. Nun mi ripozu! (ĉe ZIUTAIZA) Nu, nu, hop! (ekkuŝas) Kiel laca mi estas! Kiel laca mi estas!

Mastro: (aperas la Mastro kaj *Tarookazya*. *Tarookazya* sidas malantaŭe. Mastro ĉe ZYOOZA) Mi estas loĝanto en ĉi tiu loko. Mi havas avon prosperan. Oni diras, se al li mi donocos helikon, li certe ĝuos des pli longajn vivon kaj prosperon. Mi elvoku la serviston

りに使わそうと存(ぞん)ずる。やいやい  
太郎冠者、あるかやい。(脇座へ移動)

太郎冠者「ハア一。」

主「いたか。」

太郎冠者「お前におりまする。」

主「念無(ねの)う早かった。汝を呼び出  
(い)だすは別(べ)なることでもない。  
そちも知るとおり、こちの祖父御(おぢ)  
ほど御果報といい御寿命といいめでたい  
お方はあるまい。」

太郎冠者「仰(おほ)せらるるとおり、めで  
たいお方はございますまい。」

主「それよそれよ。それにつき、蝸牛を  
進上申せば、いよいよ御寿命御長遠な  
というによって、汝は大儀ながら今から  
蝸牛を取ってこい。」

太郎冠者「畏(かしこ)まっては、ござりま  
するが、蝸牛と申すものは、どのような  
もので、どこもとにいるものやら存(ぞん)  
じませぬによって、これはなにとぞ御免  
なされて下されい。」

主「知らずは教えてやろう。まず蝸牛とい  
うものは、土から生じて藪に住むもの  
じゃ。」

太郎冠者「ははあ、藪に住むものでござる  
か。」

主「頭(かしら)が黒うて、腰に貝を付けている」

太郎冠者「腰に貝がござるか。」

主「なかなか。その上、折々(おしり)は角  
(か)を出すものじゃ。」

太郎冠者「ははあ、角も出しまするか。」

主「劫藤(きょうとう)を経たは人ほどもあると  
いうによって、随分念を入れて、大きな  
を取ってこい。」

太郎冠者「何がさて、畏(かしこ)まって御座  
る。」

kaj li iru kapti helikon. Hej,  
*Tarookazy*, kie vi estas? (M iras al  
WAKIZA)

Tarookazy: ♪ Jen! (T iras al ZYOOZA)

Mastro: Kie?

Tarookazy: Antaŭ vi!

Mastro: Bone, tre baldaŭ vi venis.  
Mi havas ion ordoni al vi. Vi scias:  
neniu krom mia avo ĝuas tiel  
longajn vivon kaj prosperon.

Tarookazy: Jes, Sinjoro! Krom  
lia moŝto neniu alia estas tiel  
prospera!

Mastro: Certe neniu alia! Oni  
konsilis, ke mi havigu al li helikon,  
kaj li certe ĝuos des pli longajn  
vivon kaj prosperon. Tial vi iru kaj  
venigu helikon.

Tarookazy: Jes, Sinjoro! Laŭ via  
ordono mi iru ien ajn. Mi tamen  
tute ne scias, kia estas tiu heliko,  
nek kie ĝi troviĝas. Tial mi ne  
povos venigi helikon.

Mastro: Ĉar vi ne scias helikon, mi  
do klarigos pri ĝi: Unue, heliko  
devenas de tero kaj troviĝas en  
veprejo.

Tarookazy: Jes, Sinjoro, heliko  
troviĝas en veprejo!

Mastro: Due, ĝi havas nigran kapon  
kaj konkon ĉe la lumbo.

Tarookazy: Konkon ĉe la lumbo?

Mastro: Jes, ja! Trie ĝi foje elmetas  
kornojn.

Tarookazy: Ho, ankaŭ kornojn!

Mastro: Cetere veterana heliko estas  
tiel granda kiel homo. Iru kaj  
venigu kiel eble plej grandan!

Tarookazy: Jes, Sinjoro, laŭ via  
ordono!

主「早う行け。」

太郎冠者「心得ました。」

主「エーイ。」

太郎冠者「ハアー」(主は狂言座に座る)

太郎冠者「(正面を向く)さてもさても、  
こちの頼うだ人のような、ものを急に仰  
(おぼ)せ付けられるるお方は御座らぬ。  
今から見たこともない蝸牛を取ってこい  
とのおことじゃ。さりながら参らずはな  
るまい。まず急(いそ)いで参ろう(歩き  
出す)いやまことに、こう参っても、蝸  
牛があればようござるが、藪に住むもの  
と仰(おぼ)せられたによって、参ったなら  
ば、無いことは御座るまい(常座で止ま  
り)いや、来るほどに大きな藪がある。  
どれどれ、まず入ってみよう。(舞台中  
央後方で)エイエイヤツナ。(狭い隙  
間を通る所作で中央へ)ええ、これはい  
かなこと、おびたしい蜘蛛の巣じゃ。  
ははあ、これは打ち開いた、大きな藪  
じゃ。さて、仰(おぼ)せ付けられた蝸牛は、  
どこもとにいることじゃ知らぬ。少しも  
よいのに致したいものじゃが、(地謡座  
の方を見て)いや、あれに頭の黒い者  
が寝ている。もし、蝸牛でないか知らぬ。  
何にもせよ、まず起(おき)いてみよう。(山  
伏を起こす)いや申し申し、起きて下さ  
れい、起きて下されい。」

山伏「ああ、よう寝た。誰(たれ)じゃ。」

太郎冠者「私(わたくし)で御座る。」

山伏「何、私。」

太郎冠者「なかなか。」

山伏「私と言うは、誰じゃ。」

太郎冠者「ちと、用のことが御座る。  
何とぞ起きて下されい。」

Mastro: Jam iru!

Tarookazy: Jes, Sinjoro!

Mastro: Iru!

Tarookazy: Jes! (M sidas ĉe  
KYOOGENZA)

Tarookazy: (al publiko) Ho, ve!  
Ĉiam kaprican ordonon donas mia  
Sinjoro! Hodiaŭ li ordonis al mi  
de nun iri kaj venigi helikon, kiun  
mi tute ne scias. Mi tamen devas  
iel ajn plenumi lian ordonon. Nun  
mi iru haste. (ekmarŝas) Ĉu certe  
tie mi trovos helikon? Mia Sinjoro  
diris, ke ĝi troviĝas en veprejo.  
Mi iru al veprejo kaj esperu tie  
trovi helikon... (ĉe ZYOOZA) Jam mi  
alvenis al granda veprejo! Nun  
mi eniru en la veprejon! (de meze  
malantaŭe) Nu, nu, hop! (kvazaŭ  
tra malvastejo iras al la mezo) Ho,  
ve, ĝenas min multe da araneaĵo...  
Kiel vaste estas en la veprejo! Kiel  
mi trovos helikon, kion mi venigu  
al mia Sinjoro? Kiel eble plej  
grandan mi volas trovi. (rigardante  
al ZIUTAIZA) Nun mi trovis! Jen  
tie kuŝas io kun nigra kapo! Ĉu ĝi  
povas esti heliko? Antaŭ ĉio mi  
veku kaj demandu lin. (vekas la  
jamabuŝon) Pardonon, Sinjoro!  
Bonvolu vekigi, bonvolu vekigi!

Jamabuŝo: Ha, tre bone mi dormis...  
Kiu?

Tarookazy: Jen mi estas!

Jamabuŝo: Vi?

Tarookazy: Jes, mi!

Jamabuŝo: Certe vi! Kiu tamen vi  
estas?

Tarookazy: Mi havas demandon.  
Bonvolu vekigi.

山伏「(立ち) えい、ここな者は。何として、みどもを起(おき)いたぞ。」

太郎冠者「(常座で) されば、そのことで御座る。ちかごろ聊爾(りよ)な申しごとながらもしこなたは蝸牛では御座らぬか。」

山伏「なんじゃ蝸牛ではないか。」

太郎冠者「なかなか。」

山伏「それは、何ゆえ蝸牛と思うぞ。」

太郎冠者「さればそのことで御座る。蝸牛は藪に住んで、頭の黒いものじゃと申しますが、こなたの頭が黒う御座るによって、蝸牛では御座らぬかと申すことでござる。」

山伏「なんじゃ、頭が黒いによって蝸牛ではないかと言うか。」

太郎冠者「さようで御座る。」

山伏「ちと、それに待て。」

太郎冠者「心得ました。」

山伏「(正面を向き笑う) さてもさても、世には興(き)がった者もあればあるものじゃ。みどもがこれに寝ていたら、頭が黒いによって蝸牛かと申す。さだめてきゃつは愚鈍な者であろう。さんざんになぶってやろうと存(ぞん)ずる。(太郎冠者に向き直り) やいやい、そちは何のために蝸牛を尋ぬるぞ。」

太郎冠者「さればそのことで御座る。私(わたし)の頼(たの)む者の祖父御(おぢい)は大果報(だい)なお方で御座るが、それへ蝸牛を進上(しんじやう)致せばいよいよ御(ご)寿命(じゆん)御(ご)長(なが)遠(とほ)など申(ま)しまするによって、それゆえ尋(たず)ぬること御(ご)座(ま)る」

山伏「子細(こさい)を聞(き)けばもつともじゃ。さてさてそちは仕(し)合(あ)わせな者(もの)じゃ。汝(なんぢ)が尋(たず)ぬる蝸牛(かき)はみどもじゃ。」

太郎冠者「ははあ、すれば、こなたが蝸牛(かき)でござるか。」

山伏「なかなか。」

Jamabuŝo: (J ekstaras) Ba, kia sentaŭgulo! Kial vi vekis min?

Tarookazy: (ĉe ZYOOZA) Pardonon mi petas. Kvankam maldece mi devas demandi vin: Ĉu vi estas heliko?

Jamabuŝo: Ĉu mi estas heliko?

Tarookazy: Ĉu, Sinjoro?

Jamabuŝo: Kial vi vidas min heliko?

Tarookazy: Oni diris al mi, ke heliko vivas en veprejo kaj ĝi havas nigran kapon. Ĉar vi havas nigran kapon, mi supozas vin heliko.

Jamabuŝo: Ĉu vi supozas min heliko, ĉar mi havas nigran kapon?

Tarookazy: Jes, Sinjoro!

Jamabuŝo: Atendu momenton.

Tarookazy: Jes, Sinjoro!

Jamabuŝo: (J ridegas al la publiko)

Ha, ha, ha! Kian fantazion li havas! Ĉar mi kuŝis ĉi tie en veprejo kaj mi havas nigran kufon, li vidas min heliko. Certe granda idioto li estas! Mi amuzos min pri li. Ha, ha, ha! (al Tarookazy) Hej, mi demandas: Por kio vi bezonas helikon?

Tarookazy: Mi klarigos: Mia Sinjoro havas avon kun longaj vivo kaj prospero. Kun heliko, oni diras, li certe ĝuos des pli longajn vivon kaj prosperon. Por tio mi bezonas helikon.

Jamabuŝo: Mi komprenis, kial vi bezonas helikon. Vi estas bonŝanca. Mi mem estas heliko, kiun vi bezonas.

Tarookazy: Ho, vi mem estas Sinjoro Heliko!

Jamabuŝo: Jes, mi mem estas.

太郎冠者「それは私(わたし)の仕合わせで御座る。それにつき、ちとお尋ねが御座る。蝸牛は腰に貝を付けていると申すが、その貝が御座るか。」

山伏「何じゃ、腰に貝がある。」

太郎冠者「なかなか。」

山伏「今、見せてやろう。(背中をみせ) そりゃ、そりゃ、そりゃ、そりゃ。」

太郎冠者「ははあ、まことにみごとな貝で御座る。」

山伏「みごとな貝であろう。」

太郎冠者「さて、また折々は角(か)を出すと申すが、何とぞ角も見せて下さい。」

山伏「角か。」

太郎冠者「なかなか。」

山伏「角、角、それぞれ。(後ろ向きに膝をつき、結袈裟(けしき)を持ち上げ) そりゃ、そりゃ、そりゃ、そりゃ。何と、角が見えたか。」

太郎冠者「ははあ、まことにみごとな角で御座る。」

山伏「みごとであろうかの。」

太郎冠者「さてまでも、頼うだ人の申すとおおり、劫藤(りょうとう)を経たは人ほどもあると申しましたが、疑いもない、臨むところの蝸牛で御座る。何とぞ私の方へおいでなされて下さい。」

山伏「それは行きたいものなれども、この間は、方々の約束があるによって、急には、え行かれまい。」

太郎冠者「ちかごろごもつともでは御座れども、私の、これでお目にかかりましたも多生の御縁で御座る。その上、主命(しゅうめい)と申し、私の仕合わせで御座る。外々(ほか)はともかくも、何とぞ私の方へおいでなされて下さりようならば、か

Tarookazy: Vere bonŝanca mi estas!  
Nun mi havas demandojn: Oni diras, ke heliko havas konkon ĉe la lumbo. Ĉu vi havas konkon?

Jamabuŝo: Ĉu mi havas konkon?

Tarookazy: Ĉu vi havas konkon?

Jamabuŝo: Nun mi montros ĝin! (J turnas sian dorson al T) Jen, jen, jen!

Tarookazy: Ho, kiel belan konkon vi havas!

Jamabuŝo: Jes, belan konkon mi havas!

Tarookazy: Cetere oni diras, ke vi foje elmetas kornojn.

Jamabuŝo: Ĉu kornojn?

Tarookazy: Ĉu vi havas?

Jamabuŝo: Kornojn, kornojn... Jes, mi havas! (J turnis sian dorson al T kaj surgenule levas kasajon) Jen, jen, jen! Ĉu vi vidis la kornojn?

Tarookazy: Ho, kiel belajn kornojn vi havas!

Jamabuŝo: Jes, belajn kornojn mi havas!

Tarookazy: Mia Sinjoro diris, ke veterana heliko estas tiel granda kiel homo. Vi certe devas esti Sinjoro Heliko, kiun ni bezonas! Bonvolu veni al ni, mi petas!

Jamabuŝo: Kvankam mi volus veni al vi, mi ne povos, ĉar mi estas tute okupita kun aliaj invitoj.

Tarookazy: Kvankam tute okupita, vi ja havas de multaj antaŭmondoj destinon renkonti min kaj veni al ni. Cetere mi estos tre feliĉa, se mi povos plenumi la komision de mia Sinjoro. Multe mi dankas vin, se vi



たじけのう御座る。」

山伏「いや、それほどに言うならば外々はあとにして、まず汝が方へ行き、そちが頼うだ者の祖父から寿命長遠にないやろうぞ。」

太郎冠者「それはかたじけのう御座る。早う来て下されい。」

山伏「さりながら、ただは行かれぬ。囃子物(はやしもの)で行こうぞ。」

太郎冠者「囃子物は私の得物(えもの)で御座る。それは何と申して囃しまするぞ。」

山伏「別(べ)にむつかしいことでもない。そちは『雨も風も吹かぬに、出ざ(な)、かま打ち割ろう』と言うて囃せ。みどもは『でんでんむしむし、でんでんむしむし』と言うて浮きに浮いて行こう。」

太郎冠者「これは面白そうに御座る。それならば囃しましょう。」

山伏「早う囃せ、早う囃せ。」

太郎冠者「畏(かし)って御座る。(扇(あふ)で左手を打ちながら)はあへ雨も風も吹かぬに、出ざ、かま打ち割ろう、出ざ、かま打ち割ろう(常座で小さく廻る)」

山伏「へでんでんむしむし、でんでんむしむし(舞台いっぱい廻る)」

主「(囃しの途中で立ち、一の松で)最前太郎冠者を、藪へ蝸牛を取りにつかわれてござるが、あまり遅う御座るによって、迎いに参ろうと存(ぞん)ずる。(歩き出す)何をしていることじゃ知らぬ…さればこそ、あれに何やらしている。やいやい太郎冠者、汝はそれに何をしているぞ。」

太郎冠者「(舞台口へ連れて来られて)い

bonvolus veni al ni spite al multaj aliaj invitoj.

Jamabuŝo: Ĉar vi multe petas, mi venos al vi, spite al aliaj invitoj. Mi faros, ke la avo de via Sinjoro ĝuu des pli longajn vivon kaj prosperon.

Tarookazya: Elkore mi dankas vin. Nun bonvolu veni al ni.

Jamabuŝo: Mi tamen ne povas veni al vi sen takto. Mi venos laŭ via takto.

Tarookazya: Mi estas bona taktanto. Kun kiaj vortoj mi taktu por vi?

Jamabuŝo: Simplaj estas la vortoj: Pluvu kaj blovu! Elvenu Helik'!

Se ne, krevos via konko!

Mi sekvos vin per la vortoj:

Venu, venu, jen, Heliko!

Tarookazya: Amuzaj vortoj tio estas! Volonte mi taktos por vi.

Jamabuŝo: Jam ni komencu takti!

Tarookazya: Jes, Sonjoro! (frapante sian maldekstran manplaton per ventumilo)

♪ Haa! Pluvu kaj blovu! Elvenu Helik'!

♪ Se ne, krevos via konko! (dufoje) (rondiras en ZYOOZA; genulevas graslitere)

Jamabuŝo: ♪ Venu, venu, jen, Heliko!(3foje)

(J rondiras tra la tuta scenejo)

Mastro: (M ekstaras dum la taktado. ĉe la unua pino) Mi sendis *Tarookazya* al la veprejo por heliko. Tro longe li ne revenas. Mi iru serĉi *Tarookazya*.(ekiras) Kion li faras nun? ...Ho mi trovis lin! Hej, *Tarookazya*, kion vi faras ĉi tie?

Tarookazya: (kondukita al antaŭ la

や、ただいま囃子物で蝸牛を連れて参るところで御座る。」

主「なんじゃ蝸牛を連れて来る。」

太郎冠者「なかなか。」

主「どれどれ…やあ、これはいかなこと。

やいやい、あれは山伏ではないか。」

山伏「やいやい、囃せ囃せ。」

太郎冠者(山伏に)心得ました。(常座で)

へ雨も風も吹かぬに、出ざ、かま打ち割ろう、出ざ、かま打ち割ろう(山伏は『へでんでんむしむし』と舞う)」

主「これはいかなこと。やいやい太郎冠者、あれは山伏ではないか。(舞台口へ連れてくる)」

太郎冠者「やあ、山伏で御座るか。」

主「なかなか。」

太郎冠者「やいおのれは山伏ではないか」

山伏「何、山伏。」

太郎冠者「なかなか。」

山伏「山伏ということがあるものか。これはこの藪にを劫藤(りょうとう)を経たへでんでんむしむし、でんでんむしむし。」

太郎冠者「へ雨も風も吹かぬに、出ざ、かま打ち割ろう出ざかま打ち割ろう。」

主「さてもさても、むさとしたやつじゃ。やいやい、やい太郎冠者、汝はぬかれおった。あれは山伏じゃと言うに。」

太郎冠者「すれば真実山伏で御座るか。」

主「なかなか。早う打擲(ひょうりゃく)せい打擲せい。」

太郎冠者「心得ました。(常座で)やい、おのれはみどもをたらしおったな、さんざんに。」

主・太郎冠者「打擲してくりよう。」

山伏「これはいかなこと。そちたちは、そのように言うてもな、へでんでんむしむし、でんでんむしむし。」

ponto) Ho, Sinjoro! Mi taktadas por ke la Sinjoro Heliko venu al ni.

Mastro: Por ke la heliko venu al ni?

Tarookazya: Jes, Sinjoro!

Mastro: Mi vidu... Ho, kio okazas?

Hej, Tarokazya, li estas Jamabuŝo!

Jamabuŝo: Hej, taktu, taktu!

Tarookazya: (al J) Jes, Sinjoro Heliko! (ĉe ZYOOZA)

♪ Pluvu kaj blovu! Elvenu Helik'!

♪ Se ne, krevos via konko!(T dancas)

(J dancas: Venu, venu, jen, Heliko!)

Mastro: Ho, terure, terure! Hej, hej, Tarookazya, li estas Jamabuŝo! (M kondukas T al antaŭ la ponto)

Tarookazya: Ĉu li estas Jamabuŝo!?

Mastro: Jes, Jamabuŝo!

Tarookazya: Hej, vi estas Jamabuŝo!

Jamabuŝo: Ĉu mi estas Jamabuŝo!?

Tarookazya: Jes, Jamabuŝo!

Jamabuŝo: Mi ne estas Jamabuŝo, sed veterana heliko en la veprejo!

♪ Venu, venu, jen, Heliko!

Tarookazya: ♪ Pluvu kaj blovu! Elvenu Helik'! ♪ Se ne, krevos via konko!

Mastro: Kia idioto vi estas! Hej, hej, Tarookazya, vi estas sorĉita! Li estas Jamabuŝo!

Tarookazya: Ĉu vere Jamabuŝo!?

Mastro: Jes, ja! Tuj batu lin, batu lin!

Tarookazya: Jes, Sinjoro! (ĉe ZYOOZA) Hej, vi trompis min!

T kaj M: Ni batos vin!

Jamabuŝo: Ho, terure, kion vi diras! Vi tamen ne povos: ♪ Venu, venu, jen, Heliko! (T kaj M kune ektaktas.

(主と太郎冠者は共に囃し出す。山伏を先頭に、囃しながら退場する)

※へ = 歌記号, いおり点 ;JIS 第 3\_1 面 3 区 28 点

※ 臍【草冠の下に月 + 曷。臍の本字】&#xalf;(ろう)

※ 山伏：日本の役小角(えんの)を祖とする、仏教の一派、修験道の修行者。山中を巡り歩いて修行する。頭に黒い兜巾(ときん)、胴に結袈裟(ゆいぎ)、腰に法螺貝をつける。

※ 出羽(でわ)：当時の国名。現在の山形県・秋田県の大部分。

※ 羽黒山(はぐろ)：山形県の山。修験道の修行地として有名。

※ 大峯(おおね)・葛城(かつらぎ)：奈良県などの山。修験道の霊場。

※ 法螺貝：フジツガイ科のうずら紋様の、大形巻貝。吹き口をつけて鳴るように加工したものを、山伏が携帯する。

※ 結袈裟(ゆいぎ)：山伏が着用する袈裟。带状で丸い房を六ヶ所に付けている。

※ 狂言座：橋掛かりの、アト座に接続する部分

Ĉiuj dancante eliras el la scenejo)

※ jamabuŝo: asketo de ŝugendo, japana montokulto sinkretisma kun budhismo, fondita de *EN-no-Ozunu*. Li hardas sin migrante montojn kun nigra kufo, kasajo kaj konk-trumpeto.

※ *Dewa*: tiama provinco, grandaj partoj de nunaj gubernioj *Yamagata* kaj *Akita*.


※ *Haguro*: monto en la gubernio *Yamagata*, ekzercejo por jamabuŝoj.

※ *Oomine* kaj *Katuragi*: montoj en la gubernio *Nara*, sanktejo por jamabuŝoj.

※ trumpetkonko(*Charonia tritonis*): granda spiralforma konkulo, el kies konko oni faras konkan trumpeton.

※ kasajo por jamabuŝo: skapulario el maldikaj bendoj kun entute ses kvastobuloj.

※ *KYOOGENZA*: fino de la ponto ĉe la scenejo.



## 布施無経 (ふせないきょう)

狂言記拾遺、巻五の七  
登場人物：主、貧僧

貧僧「これは当寺の住僧で御座る。今日は誰殿と申(まう)方へ常齋(じやうとぎ)に参るはづでござる。参らふと存(ぞん)ずる所に、又去初(さきは)ての御方から参つてくれいと仰(おほ)られ、余儀なふてこれへ参り、唯今帰りました。常齋の事で御座る。定めて待(まち)かねて御座らふ程(ほど)に、只今からなりとも参り、勤めばかりなりと致して帰らふと存(ぞん)ずる。またこれへ参れば、定而(さだま)鳥目十疋(ちやうもくじふ)づつの布施物を下さるゝ、壱つは此(こ)下心もござり、まづそろへ参(まら)ふ。まことに思ふやふにならぬ世の中でござる。どちらぞを非時にすればよふござるに、てふど『貧僧の重ね時(とき)』と申(まう)がこれでござる。参る程(ほど)にこれじや。物申(も)、案内申。」

主「表に案内とある。どなたでござる。」

貧僧「いや、私でござる。」

主「やあ、お住持様でござるか。よふこそ御出(おい)なされました。今朝は待ちかねておりました。」

貧僧「そふでござらふ。私も常齋の事なり、参(まら)ふと存(ぞん)ずる所に、去(さ)初(は)ての御方からぜひと齋に参つてくれいと仰(おほ)られて余儀のふこれへ参り、唯今帰りました。定めて待ちかねてござらふず、遅(おそ)なわつたれど、せめて勤めばかりなりと致して帰らふと存(ぞん)じ参りました。」

主「よふこそ御出(おい)なされました。お勤めをなされてください。先(まづ)かふ

## Almozo

el “Kyoogenki Syuui” vol. 5.7  
tradukis SIMATANI takesi 2008

Bonzo: Mi estas malriĉa bonzo en ĉi tiu templo. Hodiaŭ matene mi devus viziti Sinjoron ( ) por manĝi regule regalatan manĝon. Sed kiam mi estis ekironta, iu unuafoje aperinta petis min iri kaj porpreĝi. Neeviteble mi iris kaj nur nun revenis. La sinjoro kun regula manĝo vane atendadis min. Kvankam tro malfrue por la manĝo, de nun mi vizitu lin kaj porpreĝu. Cetere je ĉiu vizito li donas al mi cent groŝojn. Nepre mi vizitu lin por la almozo. Nu, mi iru senhaste. (rondiras) Ĉagrenas la mondo. Oni diras: Malriĉa bonzo manĝas dufoje regalate... Ha, mi jam atingis la domon. (Laŭte) Saluton, sinjoro, saluton!

Mastro: Oni vokas min. Kiu salutas min?

Bonzo: Estas Mi, Sinjoro!

Mastro: Ha, Sankta Bonzo! Mi tre ĝojas, ke vi finfine venis! En la mateno mi vane atendadis vin.

Bonzo: Pardonon mi petas! Kiam mi estis ekironta al vi, iu unuafoje aperinta petis min iri kaj porpreĝi. Neeviteble mi iris kaj nur nun revenis. Kun regula manĝo vi vane atendadis min. Kvankam tro malfrue por mantenmanĝo, mi venis kaj de nun porpreĝos por vi.

Mastro: Mi tre ĝojas, ke vi venis! Nun bonvolu porpreĝi por mi. Envenu,

御通りなされませ。」

貧僧「心得ました。通りましょ。申し、こなたには、いつ参つても持仏堂をきれいにしてをかせらるゝ、奇特(きど)な事でござる。」

主「いや、左様にもござりませぬ。」

貧僧「さらば勤めを始めましょ。『如是我聞(がもん)一時仏在須菩(いちじぶつ)大王三千大千世界』。やあ、いつぞやは見事な花を下されました。」

主「されば、進ぜましたが、御役に立ちましてござるか。」

貧僧「折節寺に客がござつて仏前に立てましたれば、『扱(ぎ)も見事な花じや』と言ふて、みなほめ物でござつた。」

主「それは役に立ちまして満足に存(ぞん)ます。」

貧僧「さらや、『仏説功德(ぶつせう)布施且(ふせ)息災延命(そくさいえんめい)』。やあ、あの花は庭前にござるか、またどれからぞもらはせられたか。」

主「いや、私の庭前にござります。」

貧僧「それなら、あの花の種をもらふて植へましょ。」

主「いかにも進ぜましょ。」

貧僧「かならず忘れさせらるゝな。」

主「心得ました。」

貧僧「『南無きやらたんのふ、とらや、もはや勤(つと)を仕廻(しま)ました。かふ参ります。少(せう)寺へも御出被成(おいで)なされ。』」

主「畏(かしこ)まうてござる。参りましょ。」

貧僧「さらば。」

主「よふござりました。」

貧僧「これはいかな事、お布施の沙汰がない。忘れられた物であらふ。但し今日は遅ふ参つたによつてくれられぬか知らぬ。いや、此(こゝ)やうな事は、

mi petas.

Bonzo: Laŭ via permeso mi eniros. Ho, mirinde! Ĉiam bele aranĝita estas via kapelo. Plej diligenta vi estas!

Mastro: Ne tiel diliganta mi estas!

Bonzo: Nu, mi komencu porpreĝi: Mi aŭdis de la Budho... Subhuto... Tri miloj da mil mondoj... Ha, mi dankas, ke vi iam donis al mi belajn florojn!

Mastro: Ne dankinde! Ĉu la floroj bone servis por vi?

Bonzo: Kiam oni venis al la templo, mi ornamis la altaron per viaj floroj. Ĉiuj admiris ilin tre belaj.

Mastro: Mi ĝojas, ke la floroj bone servis por vi.

Bonzo: Budha instruo faras vin sanaj kaj longvivaj... Ĉu la florojn vi kultivis en via ĝardeno, aŭ ricevis de iu alia sinjoro?

Mastro: En mia ĝardeno.

Bonzo: Ĉu mi povus ricevi la semojn? En mia templo mi volus kultivi ilin.

Mastro: Volonte mi donacos ilin.

Bonzo: Nepre donu la semojn.

Mastro: Nepre mi donacos.

Bonzo: Namō, Granda Budho! Sankta Budho! Jen mi finis la porpreĝon. Mi foriros. Volu veni al la templo!

Mastro: Dankon! Iam mi venos.

Bonzo: Ĝis la revido!

Mastro: Mi dankas vin.

Bonzo: ...Kia domaĝo! Almozon de cent groŝoj li ne donis al mi. Eble li forgesis... Aŭ eble li ne volis doni, ĉar mi malfruiĝis. Ve, mi ne povas

かならず例になりたがる物じや。教化(きやうけ)にこと寄せて取って参らふ。申し、ござるか。」

主「やあ、これはまだ、お帰りなされませぬか。」

貧僧「いや、もはや帰りますが、いつぞはこなたに教化を致そふと存(ぞん)ますれど、終(はつ)に教化致した事もござらぬ。何と、今日お暇ではござらぬか。」

主「なか、隙(ひま)でござる。忝(かたじけなく)なふござる。教化なされてくださいませ。」

貧僧「それなら先(まづ)とおりましょ。」

主「御通りなされませい」

貧僧「扱(さ)き、教化(きやうけ)と申(まう)て別(べつ)て格別な事もござらぬ。先(まづ)人間のはかない事を申さば、天光、朝露、石の火、風の前の灯(と)し火、朝顔の花などにもたとへおかれてござる。朝顔の花と申(まう)物は、御存(ぞん)でござらふ、早朝に開き、日の出ればしばみ、夕部(ゆふ)にははらりと落つる、はかないものでござる。」

主「なか、左様でござります。」

貧僧「まだ朝顔の花は、朝開け夕部を待(ま)たし楽しみもござる。人間のはかない事を申さば、出る息、入息(いんき)を待たぬ世の中でござる。はかない事とござる。」

主「尤(まづ)、左様でござります。」

貧僧「又伝説にも『伝法ぜんと欲せば、供仏施僧捨身のもつばらとせよ。雲となり雨となる不晴(ふせ)の時』と説かせられた。かふ申ては合点が参るまい。これを一さやはらげて申時(まうすき)は、『伝法ぜん』というふは、よき法を伝ふと思はば、仏に仏器を供へ、『施僧』と申て我等ごときの貧僧に何でも施(ほ)すを『施僧』と申(まう)。又『捨身をもつ

malhavi la groŝojn, ĉar tio kreos malbonan precedencon! Mi ricevu ilin predikante. Saluton, Sinjoro, saluton!

Mastro: Ha, Sankta Bonzo! Mi kredis, ke vi foriris.

Bonzo: Kvankam mi devus foriri, trafis min la ideo, ke mi neniam predikis vin. Ĉu vi povas doni al mi vian tempon?

Mastro: Jes, mi povas! Mi dankas vin pro via komplezo. Bonvolu prediki.

Bonzo: Mi denove iros en la kapelon.

Mastro: Bonvolu enveni.

Bonzo: Kvankam mi predikos, nenion specialan mi rakontos. Unue mi predikos efemerecon de homa vivo. Ĝi similas al suna lumo, matena roso, silika fajrero, kandellumo en vento kaj farbita floro. Farbito, kiel vi scias, ekfloras matene, sed ŝrumpas en taglumo kaj falas jam vespere.

Mastro: Certe vi pravas.

Bonzo: Kvankam farbita floro povas resti ĝis la vespero, homo estas pli efemera kaj eble mortas antaŭ ol eligi la spiron, kiun li ĵus enspiris.

Mastro: Certe, certe vi pravas.

Bonzo: Budho predikis: Por sekvi la Instruon, provizu per serviloj, ofertu al bonzo kaj sinoferu, alie nubos kaj pluvos super via serena koro... Verŝajne vi ne komprenas la vortojn. Mi klarigos simple: Se vi volas sekvi Budhan instruon, provizu templon per budhoserviloj kaj ion ajn donu al malriĉa bonzo, kiel mi. La vorto Sinoferu ne postulas forĵeti vian korpon

ばらにせよ』といふは、身を捨つると書(か)いた字じゃ。そふゆふて此(こゝ)身を淵川へ持(も)て行(い)て捨(す)るではない。唯世をいとふいとはぬことじゃ。後世(ごせ)の事ならば身も命も惜しまず財宝も投げ打て後世を願ふといふ事でござる。又『雲となり雨となる』、これは世間に有事じゃ。あるいは只今までこれをあの人に何程(ほど)やらふと思ふたを、ふと惜しいと思ふてやらぬ心が出る。その惜しいと思ふ心の出来た所が晴天に村雲のかゝつたやふに雲となり雨となりでござる」

主「尤(もつ)でござります。」

貧僧「何と、合点がいきましたか」

主「なか〜、合点いたしました。」

貧僧「また『不晴(ふせい)〜の時』とまうす)は、晴れやらず晴れやらぬ時といふ事でござる。唯今も申ごとく、かのやる物はさらり〜と晴れやり、また取る物もさらり〜と取って、とかく晴れやったがよふござる。又先(まづ)のもらふ者の身になって見たがよふござる。いつも物を何程(ほど)くれるが今日(けふ)は忘れられたか、たゞし惜しいと思ふてか、と心に千万の罪を作る。すれば大きなとがじゃ。其のとがは作る者のとがではござらぬ。いつもやる物をやらぬによって、とやかふと作るゆへ、みなそのやらぬ者のとがになります。兎角(どか)やる物はさらり〜と晴れやらしやれ。」

主「畏(かしこ)まうてござる。」

貧僧「まづ教化(きょう)と申(まう)もこれまででござる。又寺へも御出被成(おいでなされ)。重而(かさ)教化致しましよ。合点が参ったの。」

主「なか〜、合点致しました。」

貧僧「合点がいけばよふござる。さらば

en profundan riveron, sed ĝi deadmonas ami monduman vivon. Ĉar postmorta vivo estas multe pli valora ol nuna monduma vivo kaj ĉiuj viaj trezoroj. Nubas kaj pluvas ofte en la mondo. Foje vi povas domaĝi ion, kion antaŭe vi regule donacis. Kaj vi jam ne volas doni tion al iu alia. Tiu domaĝo venigos nubon kaj pluvon al via serena koro.

Mastro: Certe vi pravas!

Bonzo: Ĉu vi komprenis?

Mastro: Jes, ja! Tre bone mi komprenis!

Bonzo: Super via serena koro povas veni nuboj kaj pluvo. Ne domaĝu oron kaj donacu tion, kion vi regule donacas al iu alia. Kaj tiu alia kontente prenos vian donacon. Tiam ambaŭ havos serenajn koron kaj restos nenia ĉagreno. Pensu pri tiu, kiu atendis donacon, sed ne povis preni. Lin turmentas la dubo, ĉu la donacanto forgesis donaci, aŭ li simple domaĝas oron. Tiu dubo estas granda peko! Kaj tiu dubo estas granda peko! Kaj tiu dubo estas granda peko! Kaj tiu dubo estas granda peko! Sed la donacanto, kiu ne donacas tion, kion li regule donacadis. Sendomaĝe donacu tion, kion vi regule donacas.

Mastro: Jes, Sankta Bonzo.

Bonzo: Jen estas ĉio, kion mi predikas. En la templo pli detale mi predikos. Ĉu vi komprenis?

Mastro: Jes, tre bone mi komprenis!

Bonzo: Ĉar vi komprenis, mi foriros. Ĝis revido, Sinjoro! Ha, mi

かふ参いらふの〜。ふと思出した。  
ある歌にもござる。『会ふときは語り尽く  
すと思へども別れになれば残る言の葉』  
と申て、会ふ時には忘れていてかならず  
別れになれば、何を言わふ物、いや物  
をやらふ物と思ふものじゃ。何も忘れさ  
せられた事はござらぬか。」

主「いや〜、何も忘れは致しませぬ。も  
はや御帰りなされますか。」

貧僧「さらばでござる。」

主「少(少) 御酒でも参つてござりませぬ  
か。」

貧僧「はて扱(扱)、こなたは氣を付(付)  
そふな事には付けはせいで。身どもがど  
こに酒を飲みます。」

主「まことに参らぬを忘れました。」

貧僧「もはや参る。」

主「ござりまするか、よふござった。」

貧僧「はあ…これはいかな事。いまの程  
(程)に手を取つて引回(引回)すやうに言  
ふても合点しられぬ。何とせふ。『合点  
しました〜』と、あれは何を合点した  
知らぬ。扱(扱)も是非もない事かな。  
いやいやもはや思ひ切らふ。誠に『うけ  
ごいぬればこんり致す。うけごはぬ時は  
永く生死(生死)に落(落)る』、彼(彼)  
十足(十足)の布施物を二つに押し切  
(切)、大海へさらり〜と投げ、無有も  
無もなふして往(往)ぬるに、何(何)ん  
の往なれぬ事かあらふ。あゝ、よしない  
事をくど〜思ふた事かな。…往のふへ  
〜とは思へど、また彼十足の布施物を取  
ると取らぬは、愚僧が身の上では大分  
の違ひじゃ。何とぞして取りたいが。や  
あ、思ひ付けた。方便のもつて取らふ。  
申し〜、ござるか。はて、不思議な事  
かな。」

主「やあ、まだ帰らせられぬか。何ぞ見へ  
ませぬか。」

rememoris: Estas tia kanto: Dum  
vido ĉion mi jam rakontis al vi. Sen  
vido ion mi trovis forgesita, al vi  
ne konfesita. Dum interparolo oni  
forgegas tion, kion li devus diri. Je  
disiĝo vi rememoras ion, ĉu ne?

Mastro: Ne, tute ne! Nenion mi  
forgegas. Ĉu vi jam foriros?

Bonzo: Ĝis la revido!

Mastro: Volu iom... trinki sakeon.

Bonzo: Ba, kion vi diras!? Vi ne vidas  
tion, kio estas antaŭ vi. Kaj nun vi  
kredas, ke mi povas trinki sakeon!

Mastro: Certe vi ne povus trinki.

Bonzo: Ĝis la revido!

Mastro: Ĉu vi foriros? Mi dankas vin.

Bonzo: Ho, ve... Kial li ne rimarkas?

Mi ja sugestis tiel senkaŝe. Sed  
li ne rimarkas... Kion mi povas  
fari? Sinjoro diris: Tre bone mi  
komprenis! Ba! Kion li komprenis,  
mi ne scias. Nenio helpas! Jam  
forgesu la groŝojn! Oni konsilas:  
Akceptu la sorton kaj vi vivos  
paca, alie mortos kun la ĉagreno.  
Mi povas imagi, ke mi distranĉas  
tiuajn cent groŝojn kaj enĵetas ilin  
en vastan maron. Mi povas reiri  
kun nenia ĉagreno! Ba, kial mi  
pensadis pri tia bagatelaĵo... Mi  
tamen ne povas reiri sen almozaĵo.  
Cent groŝoj estas nepre necesaj  
por mi, malriĉa bonzo. Ĉu ne estas  
bona rimedo? Ha, mi havas bonan  
ideon! (kaŝas la kasajon) Saluton,  
Sinjoro! Kia mirinda afero!

Mastro: Ho, ankoraŭ ĉi tie vi restas!  
Ĉu vi ion perdis?

Bonzo: Mirinda afero okazis! Mi



貧僧「されば、不思議のことでござる。最前教化を致すとき、私は袈裟をかけていましたとも覚(おぼ)えます。又取って下に置いたとも覚へますが、若(も)あとにはござりませぬか。」

主「されば、存(ぞん)じませぬ。尋ねませふ。」

貧僧「いや〜是(これ)、私の袈裟には印がござる。出たらばあとから持(も)して被下(きだ)。よそから帰って竿の端に掛けて置(お)きましたれば、鼠(ねずみ)がてうど銭の回(ま)り程(ほど)食いました。それを小僧が十疋(じっぴ)の布施物を、あちらへふせやり、こちらへふせをこし致しました。これが印(しる)でござる。いづぞは此(こ)穴を伏せ継がふ、伏せ縫いに致そふと存(ぞん)しました。今に継ぎも致さぬ。出ましたら跡から持(も)してください。もはやかふ参る。」

主「申し〜、それにつき、少(ち)用がござる。先(ま)待たせられ。」

貧僧「心得ました。」

主「やれ〜、いつも十疋(じっぴ)の布施物を遣(つか)します。これを忘れてやらぬにより、何かと言ふて帰らるゝ。つかはそうと存(ぞん)る。申し〜。」

貧僧「何事でござる。」

主「忘れた事がござる。いつも進(しん)ぜます布施物をはったと忘れました。取(と)て帰らせられて被下(きだ)。」

貧僧「忘れたと仰(おほ)らるゝはこれでござるか。」

主「なか〜。」

貧僧「はて扱(さ)ひ、こなたは律義な。それを今日取らぬと申て何と存(ぞん)ましよ。重而(かさねて)次手(ついで)もござらふ。もはや帰ります。」

portis kasajon, kiam mi predikis. Eble mi demetis kaj lasis ĝin en la kapelo. Ĉu ĝi troviĝas en la kapelo?

Mastro: Ne, ĝi ne estas. Mi traserĉos!

Bonzo: Ne, ne urĝas. Mian kasajon oni povas facile distingi de aliaj. Volu alsendi ĝin, se vi eltrovos. Iam foje reveninte al la templo mi pendigis la kasajon de stango. Muso faris al ĝi truon tiel malgrandan, kiel monero de groŝo. Mia subbonzo kunkudris ĝin kun tuketo malgranda kiel monero de groŝo. Tiu tuketo malgranda kiel groŝo estos la distingilo. Se vi trovos la kasajon kun tuketo de groŝo, volu alsendi ĝin al la templo. Ĝis la!

Mastro: Ha, Sankta Bonzo, mi havas aferon. Atendu momenton!

Bonzo: Bone, mi atendas.

Mastro: Ho ve! Ĉiam mi donas al li cent groŝojn, sed hodiaŭ mi forgesis almozi. Jen kial li revenas ne unufoje. Bone, mi donos... Ho, Sankta Bonzo!

Bonzo: Kio okazis?

Mastro: Mi forgesis ion. Mi ne donacis cent groŝojn, kiujn regule vi akceptas. Bonvolu preni la monon.

Bonzo: Ĉu tio estas la afero, kiun vi forgesis?

Mastro: Jes ja, Sankta Bonzo.

Bonzo: Ha, ne estu tro regulema! Mono ne gravas. Alian tagon mi prenos ĝin. Ĝis la!

Mastro: Domaĝe, se vi ne prenos. Nepre akceptu, mi petas.

主「いや〜、進ぜねば気にかゝります。  
是非とも取ってござれ。」

貧僧「いや〜、何程仰(おほ)られても、  
今日は取られぬ事がござる。」

主「それはどうした事で御座る。」

貧僧「最前から教化を致そふの、袈裟が  
見へませぬのと申て歸ったは、此(こ)の  
布施が欲しさにと思召(おぼしめす)ま  
へもござる。どふ有(あ)ても取られま  
せぬ。」

主「いや〜、ぜひともに。」

貧僧「いや〜、こなたへ預けます。」

主「いや、どふでも取ってござれ……はあ、  
申し〜、これ、袈裟がでました。」

貧僧「はあ、扱(さ)も目出たい事がご  
ざる。」

主「何事ござる。」

貧僧「お布施を下されたれば、袈裟まで  
出ました。」

主「あのやくたもない事、とつとござ  
れ。」

貧僧「はあ、面目もござらぬ。のふ〜  
はずかしや〜。」

( 終わり )

※匹:日本の貨幣単位。十文または25文。  
1文は5円〜50円。ただし貧富差は大。

Bonzo: Ne, ne. Hodiaŭ mi ne povas  
ricevi la monon.

Mastro: Kial vi ne povas?

Bonzo: Hodiaŭ mi revenadis al vi aŭ  
por prediki aŭ por perdita kasajo.  
Eble vi supozus, ke mi revenadis  
por almozo. Tial hodiaŭ mi ne  
povas preni ĝin.

Mastro: Nepre prenu, mi petas!

Bonzo: Ne hodiaŭ, sed alian tagon.

Mastro: Nepre vi devas preni! (en la  
sinon li volas enŝovi la monon) Ho,  
mi trovis la kasajon!

Bonzo: Kiel feliĉa mi estas!

Mastro: Kial?

Bonzo: Nun mi havas kaj la monon  
kaj la kasajon! (prenas ambaŭ)

Mastro: Kian absurdaĵon vi diras!  
Tuj foriru!

Bonzo: Ve, mi hontas antaŭ vi! Kia  
malhonoro, kia malhonoro!

(fino)

※ bonzo: budhana pastro.

※ regula regalaĵo: manĝaĵo, kiun  
sekulara budhano regule donacas  
al bonzo. Iam nur metene bonzo  
povis manĝi.

※ groŝo: malnova monunuo,  
bagatela sumo.

※ namo: budhana interjekcio de  
adoro.

※ peko: Estas budhisma peko  
alligiĝi al io, aparte ĉagreniĝi pro  
monavido.

※ sakeo: japana tradicia alkoholaĵo  
el rizo, kiun bonzo ne povis trinki.

## 鬼清水 (おにしみず)

狂言記外五十番の五  
登場人物：殿、冠者

殿「此辺(このあた)りの者。冠者(くわ)あるか。」

冠者「御前(おま)に。」

殿「それがしも近日茶の湯をする。清水(しみず)をくんでこい。」

冠者「野中の清水には鬼があると申(まう)程(ほど)に、許してござれい。」

殿「子共かなんぞのやうなる事ばかり言ふ。急いで水をくんでこい。此(こゝ)手桶(てお)をやる。太事(だいじ)の手桶(てお)じゃ、念(ねん)の入れい。」

冠者「畏(かしこ)まつて御(ご)ざる。」

殿「ゑい。」(冠者舞台を廻る)

冠者「はあ…にがにがしや。清水くんで来いと申さるゝ。さい〜夜も昼も清水くみに行け〜と言はりやう、参るまい。あゝ悲しや、助けい〜。」

殿「冠者、何としたぞ。」

冠者「清水をくみにかゝりますると鬼が出まして、『憎いやつの、七つ過ぎて人の来ぬ所へ、おのれめが来た。一口に取つてかまふ、わんわん。』と申程(ほど)に、足をはかりに逃げて帰りました。」

殿「清水に鬼のある事は聞かぬが。やい、手桶は何とした。」

冠者「あとではり〜と腹を立ててかみ割りしました。」

殿「はあ、大事の手桶(てお)じゃ、取りに行かふ。」

冠者「置かしられい。鬼が出ませう。」

## Fonto

el “Kyoogenki Gai50” 5  
tradukis SIMATANI takesi 2009

Mastro: Mi estas loĝanto en ĉi tiu loko. Mi vokos la serviston. Kie estas *Tarookazya*?

Tarookazya: Jen antaŭ vi, Sinjoro!

Mastro: Mi invitos gastojn al ceremonio. Iru al la fonto por pura akvo.

Tarookazya: Tio estus danĝere! Demono vivas ĉe la fonto senhoma.

Mastro: Kia infanaĵo! Rapidu al la fonto por akvo! Iru kun ĉi tiu sitelo. Bone zorgu la sitelon. Ĝi estas mia trezoro.

Tarookazya: Laŭ via ordono!

Mastro: Jam iru! ♪ Ek!

Tarookazya: ♪ Jen! ...Kia domaĝo! Mi devas iri al la fonto! Kaj nokte kaj tage mi iras al la fonto. Jam mi ne volas iri! Aj, terure! Helpu min!

Mastro: Hej *Tarookazya*, kio okazis al vi?

Tarookazya: Ĉe la fonto aperis demono! Ĝi diris al mi: “Vi aŭdacis veni ĉi tien vespere! Per unu gluto mi formanĝos vin!” Mi forkuris kaj apenaŭ savis mian vivon.

Mastro: Neniam mi aŭdis pri demono ĉe la fonto... Kie estas mia sitelo?

Tarookazya: La demono dismordis ĝin per akraj dentegoj.

Mastro: Ho, ve! Mi iru repreni la sitelon.

Tarookazya: Ne, ne iru! Demono aperos.

殿「いや〜、行(い)てくれた手桶  
なりとも取つてくる。」(殿、清水へ)

冠者「是(これ)は鬼の事はをいて、ねず  
みもあるまい。それがしが鬼になつて  
参らふ」(先回りして武悪の面と杖で  
鬼の姿に)

殿「清水に鬼のあつた事は聞きおよばぬ  
が。」

冠者「(「武悪」の面と杖で鬼の姿に)  
取つてかまふ〜。」

殿「悲しや〜、助けてくだされい。」

冠者「おのれ、冠者を疑ふて来た。頭か  
ら取つてかまふ〜。」

殿「助けてくだされい。」

冠者「冠者に酒を飲まふと言ふ程(ほど)  
飲ませうか。」

殿「中〜、飲まませう〜。」

冠者「女房を呼ぶでやらふか。」

殿「好きなよい女房を呼ぶでやりませう」

冠者「女房を呼ぶでやらずは、取つてか  
まふ〜。」

殿「呼ぶでやりませう。助けてくだされ  
い。」

冠者「其(その)儀ならば助くる。それが  
しの往(い)ぬる方を見るな。」

殿「見ませぬ。」

冠者「それ〜見るは。」

殿「見ませぬ。」(冠者戻り鬼の姿を解く)

殿「さて〜こはい事や。急(いそ)いで  
歸らふ。」

冠者「さらば迎ひに参らふ。」

殿「是(これ)はどこへ行(ゆ)ぞ。」

冠者「お迎いに参りました。鬼が生まれ

Mastro: Mi iros kaj reprenos la  
sitelon eĉ disrompitan. (ekiras al la  
fonto)

Tarookazy: Ho, ve! Tie li devas  
vidi demonon! Mi mem estu la  
demono! (antaŭvenas kun masko  
kaj bastono)

Mastro: Neniam mi aŭdis pri demono  
ĉe la fonto.

Tarookazy: (kun masko de demono)  
Mi formanĝos vin! Mi formanĝos  
vin!

Mastro: Ho, ve, terure! Ne manĝu  
min!

Tarookazy: Vi dubis *Tarookazy*!  
Pro via dubo mi formanĝos vin!

Mastro: Ne manĝu min, mi petas!

Tarookazy: Regalu *Tarookazy* per  
multe da sakeo!

Mastro: Bone, multe mi regaloj lin.

Tarookazy: Donu al li belan  
edzinon!

Mastro: Mi donos plej belan edzinon!

Tarookazy: Se vi ne donos edzinon  
al *Tarookazy*, mi formanĝos vin!

Mastro: Nepre al *Tarookazy* mi  
donos belan edzinon! Ne manĝu  
min!

Tarookazy: Bone vi promesis kaj  
mi ne manĝos vin... Ne vidu mian  
vojon!

Mastro: Mi ne vidas. (kaŝe vidas)

Tarookazy: Jen vi vidas!

Mastro: Mi ne vidas. (T reiras)

Mastro: Ho, ve, kia teruro! Mi rapidu  
hejmen!

Tarookazy: Nun mi iru renkonti lin.

Mastro: Hej *Tarookazy*, Kien vi iras?

Tarookazy: Mi venis renkonti vin,

たか。」

殿「やい〜こはい事よ。鬼が出たが、不審な。冠者がひいきをして酒を飲ませい事の、女房を呼ぶでやれの、と言ふた。」

冠者「それは珍しいことで御ざる。」

殿「そちが行(い)た時は何と言ふたぞ。」

冠者「『取つて食はふ、あゝ』と申(まう)て御ざる。」

殿「(気がついて)おれは合点(がんで)の行(ゆ)かぬ事がある。今一度行(い)て見て来(こ)う。」

冠者「ひらにな御ざっそ。」

殿「いや、行(い)て見ねばならぬ。放せ〜。」(清水へゆく)

冠者「また鬼になつて参らふ。」

殿「合点が行(ゆ)かぬ。鬼の声と冠者めが声と同じ事かと思ふ。」

冠者「(鬼の姿で)取つてかまふ〜。」

殿「(面を取って)やい冠者め、どこへ。」

冠者「あゝ許させられませい〜。」

殿「やるまいぞ〜。」

(終わり)

Sinjoro. Ĉu aperis la demono?

Mastro: Jes, ja, kia teruro! Tro strange tamen estas, ke la demono favoris al vi, *Tarookazya*. Ĝi strange postulis por vi sakeon kaj edzinon.

Tarookazya: Certe stranga postulo!

Mastro: Kion la demono diris al vi?

Tarookazya: Ĝi diris al mi: “Mi formangos vin!”

Mastro: (ion rimarkis) Ion mi suspektas. (al T) Denove mi iros al la fonto.

Tarookazya: Danĝere estus, ke vi reiru!

Mastro: Nepre mi devas iri! Lasu min iri! (reiras al la fonto)

Tarookazya: Denove mi estu la demono.

Mastro: Mi suspektas ion. Tro similas la voĉoj de la demono kaj *Tarookazya*.

Tarookazya: (kun masko) Mi formangos vin!

Mastro: (demaskinte) Jen *Tarookazya*!

Tarookazya: Pardonon mi petas! (foriras)

Mastro: Mi ne pardonos vin!

(fino)

※ te-ceremonio: japaneska ceremonio kun pulvora teo.

## 川上地蔵

狂言記外五十番卷三の五  
登場人物：盲人、女房

盲人「是(是)は此辺(このあたり)に住む者じゃ。ふと目をわづらふてめくらになった。迷惑なことじゃ。川上の地蔵へ、いかようの事も祈誓をかくるに、かなはぬ事はないと申(まう)。目の願に参らふ。女ども、ゐるか〜。」

女房「何事でおじやるぞ。」

盲人「もはや目の養生色々ですれどもよくならぬ。此(この)上は神仏(かみほとけ)を頼ふでみうと思ふが、何と思ふぞ。」

女房「いかにも神仏次第がよふおじやらふ。」

盲人「川上の地蔵へいかやうの願をかけてもかなふと人々のおしやるほどに、七日籠(七日籠)つて目の明くいたさう。」

女房「いかにもいかにももつともで御ざる。こなたの目の見えぬ事が朝夕わらはも苦になりまする。」

盲人「目が見えねば死んだがましじや。」

女房「まづお地蔵様へ七日籠らせられい。おれも連れだつて籠りまして湯茶でも進じやう。」

盲人「いやいやそなたが籠つては子供をしやうやうがない。留守してたもれ。」

女房「誠に子どもの為じや。留守致さう」

盲人「おっつけ参る。頓(とん)て下向致さうぞ」

女房「目出度(めで)目が明いて戻らせら

## Kawakami

el "Kyoogenki GaiGozyuuban" vol. 3.5  
Tradukis SIMATANI takesi 2010

Blindulo: Mi estas loĝanto en ĉi tiu loko. Mi perdis vidopovon pro malsano. Tio estas granda ĉagreno. Oni diras, ke la Ksitigarbo de Kawakami plenumas ĉian peton. Mi iru kaj petu pri miaj okuloj. Kie estas mia kara?

Edzino: Kion vi volas, kara!

Blindulo: Nenio kuracis miajn okulojn. Nun mi iru kaj petu helpon de Budho. Kion vi pensas pri tio?

Edzino: Vi pravas. Certe ĉio dependas de Budho.

Blindulo: Ĉian peton, oni diras, plenumas la Ksitigarbo de Kawakami. Sep tagnoktojn mi sidos kaj preĝos antaŭ Li.

Edzino: Bona ideo! Ankaŭ min ĉagrenas, ke vi perdis vidopovon. Bone petu de Ksitigarbo klarajn okulojn.

Blindulo: Sen vidopovo mi ne volas vivi.

Edzino: Dum vi sidos kaj preĝos sep tagnoktojn, ankaŭ mi sidos kun vi kaj pretigos viajn manĝojn.

Blindulo: Se vi sidos kun mi, malsatiĝos niaj infanoj. Bonvolu resti hejme.

Edzino: Bone, mi restos kun la infanoj.

Blindulo: Jam mi iru. Baldaŭ mi revenos.

Edzino: Revenu nepre kun klaraj

れい。待ちまするぞ。さらば〜。」

盲人「女房どもはこの外愷気深い者で、して籠れと言ふ。急(いそ)ひで参(まゐ)り、祈誓かけてみませう。をれが因果なればぜひもなし。患(わづ)いならば御地藏のお陰で目の明く事もあらふ。おびたゞしい参りさうな。」

盲人「是(これ)じゃ。拝みませう。さらば籠りませう。はあ〜、あら尊(たう)や。あらたに御霊夢が御ざった。はや目が明きました。忝(かたじ)、嬉しや〜。内々聞及(ききお)だよりもあらたなお地藏様じゃ。南無地藏南無地藏、忝、女房どもも満足に思ひませう。子どももさぞさぞ喜ぶであらふ。」

女房「是(これ)の人は目が見えぬ所で、川上のお地藏様へ一七(いちぢ)日籠ると申て参られた。心許(こもころ)なふ存(ぞん)ずる。見舞ひませう。何と目がお地藏様の御陰で明けかし、是(これ)は〜、はや下向さしらるゝ。」

盲人「そなたはどこへ。」

女房「気遣いに思ふて見舞に参る。」

盲人「よふこそ寄せたれ。お見やれ、目が明いて、昔よりよい目になつたは。」

女房「やれ〜嬉しや〜、目出度(めで)事や」

盲人「されば〜、お地藏様のあらたな御夢想で、そのまゝ目が明らかになつておじやる。」

女房「そなたは五六日も断食をしておじやると聞いたによつて、いとしや〜、痩せ衰へてひだるからふと思ふたが、殊外(ことのほか)色もよし。つや〜して戻つたが合点が参らぬ。」

盲人「目が此(こゝ)ごとくに明らかに成程(なるほど)の事じや所で、ひだるうも少

okuloj. Ĝis revido, mia kara!

Blindulo: Mia edzino estas tro ĵaluza kaj mi timis, ke ŝi ne akceptos mian foreston. Feliĉe ŝi lasis min iri kaj sidi sep tagnoktojn. Mi rapidu iri kaj bone petu klarajn okulojn. Mi esperas, ke Ksitigarbo plenumos mian peton... Ha, kiel multaj iras kun mi por peti!

Blindulo: Jam mi atingis la templon. Jen ĉi tie mi sidu kaj petu...(preĝas) Ho, kia mirindaĵo! Nokte en mia sonĝo aperis Sankta Ksitigarbo! Jam klarajn okulojn mi havas! Kia feliĉo! Certe ĉiopova estas Sankta Ksitigarbo! Mi dankas al Li multe! Ĝojos ankaŭ mia edzino. Jubilos ankaŭ miaj infanoj.

Edzino: Mia edzo iris al Kawakami por peti de Ksitigarbo klarajn okulojn. Sep tagnoktojn li sidadis. Mi venu kaj zorgu pri li... Mirinde jam liaj okuloj estas klaraj! Sen bastono li iras al mi!

Blindulo: Kial vi venis ĉi tien?

Edzino: Por zorgi pri vi, mia kara.

Blindulo: Koran dankon! Vidu: nun miaj okuloj estas tute klaraj.

Edzino: Kia ĝojo! Mi jubilas por vi!

Blindulo: Sankta Ksitigarbo aperis en mia sonĝo. Dank' al lia graco mi vekigis kun klaraj okuloj.

Edzino: Sep tagnoktojn vi sidadis sen manĝo, ĉu ne? Vi devus esti tute laca kaj malsata. Kial vi fartas tiel bone? Vi ja ŝajnas tute vigla kaj freŝa.

Blindulo: Dank' al Ksitigarbo mi estas same vigla kaj freŝa, kiel

(すじ) もなし。成程(なるほど) 皮膚もよいと思はしませ。」

女房「いや〜、只事ではない。合点が参らぬ。」

盲人「神仏のお陰じや所で、只事ではないはづじや。」

女房「をのれ知らぬと思ふか、わ男め。内々聞及だ。誰(た) そ酒や肴色々の物を持つて行(い) て、馳走し手があらふ。」

盲人「そなたより外に誰が見舞ひませうぞ。訳もない事言はしますな。」

女房「腹立ちや〜、をれに隠しをつて。さい〜寄り合ふて、知つた〜、憎いやつの。腹立ちや〜。」

盲人「さても〜無理な事言ふ女房じや。弓矢八幡脇心はないぞ。」

女房「いやの空誓文や。ありのまゝに、隠さずとも、言ひをるまいか。」

盲人「はあ〜、また目がつぶるゝ。悲しや〜。」

女房「をのれ、つぶれもせぬ目をつぶしたと言ふてだまさるゝ事ではないぞ。」

盲人「だまさう事ではない。悲しや、真実つぶれたは。」

女房「空目をつぶすか。腹の立つ事や〜。何がつぶりやうぞ。」

盲人「いや、どこがどこも見えぬぞ。許せ〜。」

女房「どこへ。やるまいぞ〜。」

盲人「許せ〜。」

( 終わり )

klaraj estas miaj okuloj.

Edzino: Ba, vi ne azenigos min! Mi ne kredas viajn mensogojn.

Blindulo: Ne mensogo, sed graco de Sankta Ksitigarbo!

Edzino: Ne mensogu min, malsaĝulo! Mi aŭdis, ke iu virino servis al vi sakeon kaj manĝon!

Blindulo: Neniu krom vi servas por mi. KREDU min, mia kara.

Edzino: Kia ofendo! Vi mensogas min! Vi ja kolombumis kun la virino! Mi scias. Ofendo de via flanko!

Blindulo: Maljustaj vortoj! Neniam mi mensogis vin.

Edzino: Ĉiam vi mensogas min! Konfesu pri via virino!

Blindulo: Ve, mi perdos vidon! Ve, doloras la okuloj!

Edzino: Ankoraŭ nun vi mensogas! Jam vi havas klarajn okulojn.

Blindulo: Ne, mi ne mensogas vin. Denove mi fariĝis blindulo.

Edzino: Mensogo! Viaj okuloj estas klaraj.

Blindulo: Jam ne klaraj! Nenion mi povas vidi. Pardonu min!

Edzino: Kien vi iras?! Mi ne pardonos!

Blindulo: Pardonu min, pardonu min! (fino)

※ Efiko de budha graco dependas de la interna paco de la favorato. Blasfemo de la edzino tro ĉagrenis la edzon kaj rompis la gracon.



## 盆山 (ぼんさん)

狂言記外五十番巻三の六  
登場人物：源蔵、権兵衛

源蔵「是(これ)は此辺(このあた)りにすまみ致す者で御ざる。それがし存(ぞん)た方に盆山をあまた持てゐらるゝ。一つ所望致せども、しはい人でくれられぬ。あまり欲しう御ざる程に、今晚忍び入て、案内(あんい)なしに取つて参らふと存(ぞん)ずる。やあ、さて、しはい人で御ざる。あのたくさん盆山の内を、一つなどくられたとあつて、別(べつ)の事も御ざるまいに、扱(さく)も〜しはい人で御ざる。

や、参る程に是(これ)じや。是(これ)はいかな事。此中(このちゆう)作事(さくじ)を致されたと見えて、仲々きびしうて入られぬ。裏へ回つてみやうと存(ぞん)ずる。はあゝ、面(おもて)の屋作りとは違ふて粗相な事で御ざる。此(こゝ)よし垣をさへ破れば、あなたは坪の内じや。まづよし垣を破らふ。ざく〜、めり〜。さても〜鳴つたり〜。何と人は聞かなんだかじやまで。いやいや、人音もせぬ。さらば入らふ。さて盆山はどこにある事じやぞ。や、是(これ)にある。扱(さく)も見事な盆山じや。是(これ)にせう。扱(さく)も〜見事な事ではあるぞ。」

権兵衛「何じや、盗人が入つたと言ふか。面へも裏へも人を回せ。壱人もやる事ではないぞ。」

源蔵「是(これ)は何としたものであらふぞ。」

権兵衛「がつきめ、やるまいぞ。あの小さい盆山の外へ隠れたとあつて、見えまい事は。や、月夜影にすかして見れば、確かに源蔵じや。余の盗人とは違

## Miniatura

el “Kyoogenki GaiGozyuuban” vol. 3.6  
Tradukis SIMATANI takesi 2011

Genzoo: Mi estas loĝanto en ĉi tiu loko. Mia amiko havas multajn miniaturojn de montaraj pejzaĝoj. Kvankam mi petis unu, li estas avara kaj nenion donis al mi. Nepre mi havigu al mi liajn miniaturojn. Hodiaŭ nokte mi sekrete vizitu lin por ricevi kelkajn miniaturojn sen lia permeso.(ekiras) Kiel avara li estas! Tute ne gravas por li unu aŭ du el multaj miniaturoj. Vere avara li estas!

Ha, mi jam estas antaŭ lia domo. Ho, domaĝe! Lasta-tempe li plifortigis la muron! De la fronto oni ne povas eniri. Mi iru al la dorsa flanko... Hura! La dorson li baris pli aĉe ol la fronton. Mi segu la kanojn de la palisaro kaj mi estos en lia korto... Grinc, grinc, grinc! Krak, krak, krak! Ve, tro brue! Eble oni aŭdis min... Feliĉe neniu venas! Mi eniru tra la truo de la palisaro. Nu, nu, hop! Kie estas la miniaturoj? Jen, ĉi tie! Kiel belaj ili estas! Kvazaŭ mi vidas verajn montojn!

Gonbee: Damne! Oni enpenetris mian domon! Gardu la fronton kaj la dorson! Neniu forkuru el mia domo!

Genzoo: Ho, ve! Kiel mi savu min?

Gonbee: Jen la kanajlo! Malantaŭ la miniaturo li vane kaŝas sin. Sub luno mi povas vidi la vizaĝon... Ho, ve, li estas Genzoo! Malkuraĝa

ふて心のやさしい所が御ざる。なぶつて帰さうと存(ぞん)る。盆山の陰へ隠れたを人かと思へば、まづ人ではないぞ。犬じや。犬ならば、鳴きさうなものじやが。」

源蔵「是(これ)は鳴かすばなるまい。びやう〜」

権兵衛「びよう〜。扱(せ)も〜鳴いたり〜。犬かと思へば、又犬でもないは。烏じやは。烏ならば鳴きさうなものじや。」

源蔵「是(これ)も鳴いて喜ばせう。こかあ〜。」

権兵衛「あはゝはゝ」

源蔵「扱(せ)も喜ぶは。」

権兵衛「烏かと思へば、又烏でもないは。猿じや。猿ならば身ぜせりをして鳴かふ事じやが。」

源蔵「是(これ)も鳴いて喜ばせう。」

権兵衛「鳴かふぞよ。」

源蔵「きや〜〜」

権兵衛「あはゝはゝ。最前から何かと言へども、みなことごとくまねをする。何ぞまねをせぬ事が申(まう)たいが。や、思ひ出した。最前から何かと言へども、みなそれがしが目違いじや。よふ見れば鯛じやは。」

源蔵「又鯛じやと言ふは」

権兵衛「鯛ならばひれを立てそうなものじやが。」

源蔵「是(これ)も立てずはなるまい。」

権兵衛「ありや、立てたは。鯛はひれを立てて後はかならず鳴くものじや。鳴かふぞよ。」

